

Indekso


decembro 1971

64-a jaro

n-ro 792 (12)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Scienca
evoluo
kaj la jaro
2000

Vi trovos

sur la apuda paĝo jarfinan mesaĝon de la nove elektita prezidanto de nia junulara sekcio, Renato Corsetti. Lia tezo, ke urĝas ekvilibrigi la disvastiĝon de Esperanto tra ĉiuj kontinentoj, certe ne estas nova, sed estas nature, ke ĝin pli forte akcentu la nova generacio kreskinta en epoko de mondaj televidelsendoj per satelitoj kaj de ŝanĝigantaj potencpolitikaj rilatoj. Kalejdoskopon bildon pri la estonta evoluo, tiel de komunik-rimedo kiel ankaŭ de la vivnivelo en diversaj partoj de la mondo, donas la premiita eseo de d-ro H. Maschler pri scienca evoluo kaj la jaro 2000 (sur la paĝoj 204-205).

Samtempe ni ĵetas rigardon en la pasintecon, rememorante la aŭtoron de Esperanto, kiu naskiĝis en decembro antaŭ 112 jaroj. Lia ĵus publikigita manuskripto (p. 202-203), kvankam nun anakronisma, tre vive sentigas la konfliktojn, kiuj, sendube, ofte regis lian koron: inter la intereso de la Internacia Lingvo, kiaj li konceptis ilin, kaj la distiraj postuloj de plej diversaj opinioj en la juna kaj nestabila Esperanto-movado.

La Zamenhof-Tago estas samtempe la Tago de la Esperanta Libro, kaj, kvankam ĉi-monate vi trovas nur unu paĝon da recenzoj, en la indekso aperas (p. 218) listo de ĉiuj libroj recenzitaj sur niaj paĝoj dum la pasinta jaro.

Enhavo

- 201 Ekstereŭropigo — Tasko de TEJO (Corsetti)
- 202 Historia manuskripto de Zamenhof
- 203 Nekrologo: Carlsson-Bohman
- 204 Scienca evoluo kaj la jaro 2000 (Maschler)
- 206 Recenzoj
- 207 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 207 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 208 TEJO-paĝo
- 209 57a Universala Kongreso, Portland (Oregon), Usono
- 212 Leteroj de legantoj
- 214 Komenco bona — ĉio bona
- 214 Kelkaj principoj
- 216 Oficiala informilo: n-ro 451
- 217 Anoncetoj

La kovrilo

simbolas la kreskantan aŭtomatigon de ĉiuj flankoj de la industria, transporta kaj administra laboro, ekde aŭtomata rapidumoŝanĝo en aŭtomobiloj ĝis la kompleta telestirado de tuta fabriko fare de unu sola teknikisto. La signifo de tiu aŭtomatiga revolucio por la plukonstruado de la teknika civilizo ĝis nun apenaŭ estas pripensita, kaj la sociaj ŝanĝoj, kiujn ĝi kunportas, ankoraŭ malpli estas komprenataj. (p. 204)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktorino: Nagata A.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro:

22,50 gld. (kun membreco kaj Jar-

libro: 30,— gld.). Unuopa ekzempl-

ero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto al-

donu: Aŭstralio, Nov-Zelando 20,90;

Arg., Braz., Jap., Sud-Afr. 14,30;

Kan., Uso., 11,—; Israelo 7,70 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p.

150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld.

1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak

10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la

Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel

en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

EKSTEREŬROPIGO — TASKO DE TEJO

Malkreskigi la ĝisnunan superpezon de Eŭropo en la Esperanto-movado kaj aktivigi la ĝeneralan membraron de TEJO laŭ la linio de la konata Deklaracio de Tyresö — en batalo kontraŭ lingva imperiismo kaj en solidareco kun la junulara protesto — jen la du ĉefaj taskoj, kiujn la nova prezidanto de TEJO, Renato Corsetti, tenas antaŭ siaj okuloj. D-ro Corsetti pli frue gvidis regionan agadon de TEJO.



R. Corsetti

Esperantujo estas, kaj eble ankoraŭ estos dum kelkaj monatoj, malgranda lando. Ĝiaj loĝantoj frontas multajn problemojn, inter kiuj la interkomunik-problemo, malgraŭ la sama lingvo, ĉar ili estas tre disaj sur granda surfaco. Ĝiaj administraj organoj estas ne tre fortaj kaj, pro la absoluta demokratio reganta en tiu landeto, ili havas nur teorian povon al la "regatoj".

Pro tio, kaj pro pluraj aliaj kialoj, kiujn la legantoj de ĉi tiu respektinda gazeto bone konas, Esperantujo rolas, antaŭ la aliaj landoj, kiel tiuj foraj landetoj, kiuj ensorbas la alilandajn pensmanierojn, modojn ktp. nur malrapide kaj pene kaj kun kelkaj jaroj da malfruo.

Historia festparolado

Ni konsideru ekzemple la junularan konsciiĝon kaj sekvan protestmovadon, kiu boligis la junularon en ĉiuj mondopartoj dum la jaroj sesdekaj.

Fine ankaŭ la junaj esperantistoj en la jaro 1969, inter unu interkona vespero kaj unu disputo pri la uzo de la akuzativo, ekrimarkis la fenomenon. Ĝi estis fokuso de festparolado (tondre aplaŭdita, kiel cetere ĉiuj festparoladoj), kaj ekde tiam la sveda vilaĝo, kie estis aplaŭdita la menciita historia festparolado, tio estas Tireso (Tyresö), disfamiĝis tra la tuta Esperantujo. Ĉi tiu nomo estas de tiam ligita al la konsciiĝo de la esperantista junularo, kiu solene rezoluciis, ke la batalo por Esperanto estas batalo por la homa digno, kontraŭ la establita ordosistemoj, ktp.

Kiel en ĉiuj aliaj landoj la malpli juna generacio surpriziĝis, ne komprenis, miskomprenis kaj alarmiĝis, la juna generacio kontraŭargumentis kaj... entute okazis aro da paroladoj kaj fluis maroj da inko (ankoraŭ nun kiel vi povas konstati legante ĉi tiujn liniojn). Nur io ne okazis, tio estas grandskala aplikado de la principoj entenataj en la deklaracio de Tireso al la pri-Esperanta informado, sed por grandaj teoriuloj, kiel la esperantistoj, tio estas ja banala detalo.

Laŭ mia scio kerno da junaj esperantistoj laborantaj laŭ la principoj de la multe ŝvingita Tireso-standardo ekzistas nur en malpli ol dek lokoj. Kaj la aliaj miloj da junaj homoj rekte kaj nerekte organiziĝintaj en TEJO kaj ties Landaj Sekcioj? Ili konsistigas nian "silentan plimulton", kaj ilin ni devas "vekigi", antaŭ ol la historiaj kondiĉoj, kiuj naskis la Tireso-deklaracion, ŝanĝiĝos en la rapidege ŝanĝiĝanta mondo, kiu nin ĉirkaŭas, al kies postuloj devas esti adaptita nia agado. Jen granda tasko kiun TEJO klopodas plenumi; sed ĝi povos esti plenumita certe ne de la estraro aŭ de la komitato aŭ de aliaj funkciuloj sed nur de la tuta celkonscia membraro. Ĉi-rilate mi ŝatus ankaŭ atentigi la malpli junajn esperantistojn

pri la neekzisto de iu vera "generacia fendo" en Esperantujo. Temas pri supraĵaj diferencoj en manieroj, inform-metodoj, vortumoj ktp., sed la esenca celo, disvastigo de Esperanto, plurestas komuna al ni ĉiuj.

Dua tasko: ekstereŭropigo

Dua urĝa tasko por TEJO kaj ĝenerale por la Esperanto-movado en la nuna momento estas, laŭ mi, la ekstereŭropigo de la movado.

En la homa historio difinitaj mondopartoj laŭvice funkciis kiel elradiaj centroj de la kultura vivo. El la okcidenta mondo oni havis sinsekve Grekujon, Romanon, la arabajn landojn, la nordeŭropajn landojn ktp. En Eŭropo dum la ĵus pasintaj jarcentoj, kaj iugrade ankoraŭ nun, la homoj kutimis opinii, ke Eŭropo estas la laŭnatura civiliza centro de la tuta mondo. Nuntempe ĝi ne plu estas tia. Ĝi jam perdis gvidan rolon en pluraj branĉoj de la homa aktiveco kaj plue ĝin perdadas. Neagnosko de tio ĉi estas laŭ mi simpla sintrompo.

Ĉi tiu fakto estas jam konata por multaj; nur en Esperantujo, kie la novaĵoj "... ne brue, nur poste malfrue..." enpenetras, oni malfacile ĝin agnoskas. Pro la naskiĝo de Esperanto en Eŭropo, pro la nesufiĉaj rimedoj, pri kiuj la movado disponas, ktp., oni emas fokusi sian atenton nur al eŭropaj lingvaj problemoj, al eŭropaj okazaĵoj, kaj taksu ĉion ĉi monda. Sufiĉas rigardo en la jarlibron por malpravigi la tutmondecon de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj la universalecon de Universala Esperanto-Asocio.

Estu klare, ke mi ĉi tie ne intencas akuzi iun ajn pro ĉi tiu situacio, sed nur ĝin reliefigi. Ankaŭ ne estas ĉi tie la taŭga loko por priparoli eblajn planojn por agi ekstereŭropon malgraŭ niaj tre modestaj rimedoj. Mi nur volas diri, ke tamen ni devas ion fari. Inter alie la lingvaj problemoj de afrikaj kaj aziaj landoj estas ege pli komplikaj, ol tiuj de eŭropaj ŝtatoj, kaj kutime ekstereŭropanoj havas malpli da antaŭjuĝoj rilate al Esperanto ol eŭropanoj. Krome, nur kiam Esperanto estos egale disvastiĝinta tra la tuta mondo, ĝi povos plene respeguli la internacian kulturon kaj kontribui al la estiĝo de iu homa supernacia kulturo.

TEJO jam faras, kaj estonte plu faros, paŝojn en ĉi tiu direkto, kaj ĝi atendas de ĉiuj siaj membroj kaj de la tuta movado konsciiĝon pri ĉi tiu temo.

Dum la venontaj jaroj ni klopodu transdoni Esperanton kaj ilian respondecon en la disvastigo de la internacia lingvo ankaŭ al la aliaj kontinentoj.


Nur tiel ni povos post iom da tempo vere esti universalaj, ne nur surbaze de nia titolita papero sed pro la tutmonda konsisto de nia membraro.

RENATO
CORSETTI

HISTORIA MANUSKRIPTO DE ZAMENHOF

Okaze de la Zamenhof-Tago

Kiam mortis d-ro Zamenhof en 1917, sur lia skribotablo postrestis kelkaj nefinitaj manuskriptoj. La vidvino donis ilin al prof. Privat, kaj tiu en 1962 donacis unu el ili al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW). Dank' al la deĉifra laboro de s-ro A. Holzhaus (Usono) kaj la kunlaboro de IEMW, ni povas nun publikigi grandan parton de tiu manuskripto, verkita, kiel el ĝia teksto evidentiĝas, en 1915. Sendube sub la influo de la Ido-skismo kaj la multaj aliaj reformprojektoj en la frua historio de la lingvo, Zamenhof antaŭvidis 'porĉiaman revizion de Esperanto', tamen sub la kondiĉo, ke ĉiu ŝanĝo rilatu ne al 'punkto disputebla' sed al 'maloportunaĵo senduba', kaj ke decidan voĉon havu la Lingva Komitato. Hodiaŭ, pli ol duonjarcenton poste, la vivo jam postlasis tiajn ideojn. En lingvo enradikiĝinta eĉ kiel familia lingvo oni ne venas al ideo fari 'reviziojn'. Tamen, malgraŭ sia malaktualeco, la manuskripto havas, kiel ĉiuj vortoj de Zamenhof, grandan historian kaj stile-lingvan intereson.



Ĉi tiu mia artikolo, pro sia unuamomenta impresio, facile povos esti malĝuste komprenata kaj ŝajni, kvazaŭ mi intencas elpaŝi kun ia reformado de nia lingvo. Tial mi antaŭ ĉio insiste petas la legantojn, ke ili juĝu ne laŭ la unua impresio, sed laŭ la esenco, kiun ili estas petataj bone pripensi kaj klarigi al si. Mi atentigas tuj en la komenco, ke mia opinio pri la evoluo de nia lingvo neniam ŝanĝiĝis, sed restis absolute tute sama, kia ĝi estis de la Bulonja Kongreso ĝis nun. Mi intencas fari absolute nenian atencon kontraŭ la "Fundamento de Esperanto", sed mi volas nur proponi provon de praktika apliko de tiuj ideoj, kiuj estas teorie elmontritaj en la Antaŭparolo al la "Fundamento", kaj kies apliko pro diversaj cirkonstancoj dum longa tempo estis ne farebla.

La demando pri 'perfektigoj'

De la unua momento de la apero de Esperanto nian movadon konstante akompanis teda ombro, kiu jam kaŭzis al mi tre multe da malagrablecoj kaj malhelpoj: tio estas la demando pri "perfektigoj". De tempo al tempo tiu demando elŝoviĝas akre kaj eĉ minace, poste ĉio trankviliĝas, sed eĉ la ŝajne plej granda trankvileco ne donas al ni garantion, ke baldaŭ la malfeliĉa demando ne eksplodos denove, eble tute neatendite, aŭ ne komencos sian kaŝitan mordetadon.

Pro la stato de milito, kiu regis en nia afero, mi dum la lastaj jaroj nenion parolis pri la demando de perfektigoj; ĉar en tempo de maltrankvileco la unua ordono estas: stari forte. Sed nun, kiam dank'al la fideleco de la tuta esperantistaro la tumulto pli aŭ malpli pasis, kiam ni ne bezonas plu timi, ke trankvila teoria analizado vekos diversajn "apetitojn", kiam la sento de disciplino tiel forte penetris en la konscion de ĉiuj esperantistoj, ke ni ne bezonas plu timi diversajn ribelojn, nun ni povas trankvile paroli.

En tia afero, kiel nia, la ekzistado de la demando pri plibonigoj estis per si mem tute natura kaj neevite-

bla. Estas vero, ke en la nuna tempo la grandega plimulto de esperantistoj konscias, ke ni devas labori ne por la akirado de ia (cetere tute neatingebla) "absoluta perfekteco" de la lingvo internacia, sed por la plena fortikigo de la ekzistado de nia lingvo; ke ni povas atingi nian celon nur per severa konstanteco, sed ĉiu (eĉ plej malgranda) ŝanĝo en la lingvo ruinigos nian tutan aferon; ke se ni komencos fari eĉ plej malgrandajn ŝanĝojn, ni neniam povos halti; ke nia lingvo vivos nur tiam, kiam ni respektos ĝin kiel lingvon vivantan kaj ne permesos al ni iajn eksperimentojn tiel same, kiel ni tion ne permesas al ni kun ĉiu alia vivanta lingvo. Tamen ne ĉiu (esperantisto) mondolingvisto estas absoluta konservemulo.

Pacienco kaj konstanteco

Ni ne parolas pri tiuj, kiuj rigardas novan lingvon kiel nur naskiĝantan, kiuj senorde kaj sendiscipline penas ĝin ŝanĝi ĉiu laŭ siaj ideoj; en tia senfina reciproka kritikado kaj "plibonigado", kiu jam delonge estus pereiginta la tutan mondolingvan ideon, se ni ĝin ne gardus per nia pacienco kaj konstanteco, ili ekstermos sin mem, kaj ni trankvile iros nian vojon ĝis ni plene atingos nian celon. Sed eĉ inter la plej fervoraj respektantoj de la vivo kaj rajtoj de nia lingvo troviĝas personoj, kiuj, eble ne tute senprave, diras jenon:

"Ni plene konscias, ke en lingvaj aferoj la ĉefaĵo kaj la "*conditio sine qua non*" estas plena unuformeco kaj konstanteco; ni plene konscias, ke ĉia eksperimentado sur vivanta organismo estas danĝera por ĝia vivo, kaj ke ni devas uzi Esperanton tian, kia ĝi estas, aŭ tute ĝin ne uzi.

Praktika elprovado

Sed ĉiu vivanta organismo havas partojn, kies blinda netuŝado estus tute malprava kaj donus al ni nur sencelajn maloportunaĵojn (ekzemple se ni timus tranĉi niajn harojn aŭ ungojn, por ne fari ian "kontraŭnaturajn"). Ni uzas nun Esperanton en tiu formo,

kiun donis al ĝi ĝia aŭtoro post longa laborado en kabineto antaŭ ol ĝin sufiĉe elprovis larĝa vivo praktika. Depost la momento de ĝia apero Esperanton ĉiuflanke elprovis la vivo; tre multaj miloj da homoj dum multe da jaroj kaj en la plej diversaj statoj uzis ĝin kaj elprovis ĝin praktike; la lingvo montriĝis tute vivipova, tamen dum la multejara kaj multehoma praktika elprovado certe ne povis ne montriĝi, ke ekzistas en la lingvo tiu aŭ alia maloportuna bagatelo, kies maloportunecon la kreinto de la lingvo ne povis bone rimarki en sia kabineto, sed kiu poste en la praktika vivo montriĝis kiel io tre ĝenanta kaj samtempe tre facile forigebla; kial do ni ne forigu tion? Kial ni tute sencele devigu ĉiujn estontajn uzantojn de la lingvo eterne treni kun si la ĝenantan maloportunaĵon (kiu restis en la lingvo simple nur pro nerimarkiteco kaj) kiu povas facile esti forigita absolute sen ia danĝero aŭ maloportuneco por la lingvo? Ĉu ni devas timi, ke se ni hodiaŭ forigos iun punkton, morgaŭ montriĝos aliaj forigindaj punktoj kaj ni devos senĉese rekonstrui la lingvon? Ne, absolute ne! Ĉar ni parolas ja ne pri punktoj disputeblaj (kiujn tuŝi ni ne devas), sed nur pri maloportunaĵoj sendubaj, kiuj restis en la lingvo sole nur pro manko de sufiĉa praktika elprovo. Sed kio restis kaŝita por unu homo en la daŭro de kelke da jaroj kaj ĉe laborado unuflanka, ne povis ja resti kaŝita al dekmiloj kaj centmiloj da homoj en la daŭro de 28 jaroj kaj ĉe elprovado ĉiuflanka. Ekzistas sekve nenia eĉ plej malgranda dubo, ke maloportunaĵoj, kiuj ne estas trovitaj en la lingvo ĝis nun, estos trovitaj en ĝi neniam. Ni sekve povas esti tute certaj, ke se ni nun per plej vasta enketo kaj unuanima interkonsento revizios la tutan lingvon kaj forigos el ĝi ĉion, kio post multejara, multehoma kaj ĉiuflanka elprovado montriĝis kiel sendube maloportuna kaj samtempe facile forigebla, ni poste jam neniam devos ripeti la saman laboron. La lingvo tiam ricevos sian tute definitivan, oportunan kaj nedisputeblan formon por ĉiam; kaj tiam por ĉiuj homoj, kiuj efektive respektas la vivon kaj rajtojn de nia lingvo, la malfeliĉa demando pri plibonigoj, kiu kaŝite mordetas la koron eĉ de la plej fidelaj esperantistoj, malaperos por ĉiam.

Tiam malaperos por ĉiam la glavo de Damoklo, kiu konstante pendas super nia lingvo, kiel ajn ni kovris antaŭ tio niajn okulojn, tiam la lernanto havos plenan certecon, ke li neniam devos ion relerni; tiam ĉiu verkisto havos plenan certecon, ke liaj verkoj neniam fariĝos senvaloraj. Ni deziras do, ke oni unu fo-

jon por ĉiam faru detalan revizion de nia tuta lingvo, kaj – tuŝante nenion, kio estas disputebla, oni forigu el la lingvo por ĉiam ĉion, kio montriĝis kiel sendube maloportuna kaj sendanĝere forigebla.

Tiel parolas (aŭ almenaŭ kaŝite pensas en sia interno) multaj tre fervoraj kaj fidelaj esperantistoj. Ĉia malpermesado aŭ terorisma sufokado de tiuj vortoj aŭ pensoj kondukas al nenio. “Kial ni konservu en nia lingvo tiujn kelkajn bagatelojn, kiuj estas simple frukto de teoria nerimarkeco, kiuj ĉiujn nin konstante ĝenas kaj tamen povas esti tre facile forigataj?” Ĉi tiun tute naturan demandon, kiu nin konstante tedados, ni devas ne perforte kaj senrezulte sufokadi, sed ni devas doni al ĝi ian solvon, ĝis ni fine donos al ĝi ian solvon. [Tiel en la manuskripto. – Red.]

La fama fabla urso

Agante propravole, ni povas doni al tiu demando solvon tre facile, en tempo kaj maniero plej oportunaj; sed se ni perforte nur sufokados tiun naturan demandon, ĝi pli aŭ malpli frue eksplodos kontraŭ nia volo (kiel ĝi faris jam kelkfoje) en tempo kaj maniero tre maloportunaj kaj eble tre danĝeraj por nia afero. Se ni, esperantistoj, la solaj kompetentuloj en la aferoj de nia lingvo, ne solvos tiun demandon konforme al nia sperto kaj al nia profunda amo al la afero, tiam povos okazi, ke iam la registaroj, decidinte akcepti nian lingvon, transdonos ĝian korektadon al personoj, kiuj havos famajn nomojn, sed absolutan senpertecon en nia afero, kaj ĉi tiuj agos simile al la fama fabla urso, kiu, intencante mortigi muŝon sur la frunto de sia gvidanto, frakasos lian kapon.

Ni devas do trovi solvon por malfeliĉa demando, kiu konstante pendos super nia lingvo kiel la glavo de Damoklo. Ni devas (unu fojon por ĉiam) tre atente kaj detale revizii nian tutan lingvon...* La revizio devas esti farata en maniero plej lojala; decidu voĉon devas havi nur nia Lingva Komitato** kaj nur tion, kion la Lingva Komitato akceptos, ni ĉiuj devas rigardi kiel akcepteblan. Kiel ajn!

* Zamenhof ne finis poluri la frazon kaj en la originalo troviĝas notetoj “Ne timu! Mi ne volas proponi al vi ian lingvan revolucion, kiu en aliaj aferoj eble povus utili, sed en afero de lingvo internacia estas absolute nepermesebla.” (red.)

** Lingva Komitato fondiĝis dum la 1a UK en 1905; ĝia membraro konsistis el 102 personoj el 28 nacioj. Iom post iom ĝi metamorfozis sin en la nunan Akademion de Esperanto. (red.)

D



M. Bohman-Carlsson

NEKROLOGO

MAGDA BOHMAN-CARLSSON (1896-1971)

La 7an de septembro 1971 forpasis en Svedujo Magda Bohman, internacie konata kiel Esperanta poetino sub la nomo Magda Carlsson. Lerninte la lingvon en 1931, ŝi rapide ekmastris ĝin, kaj jam en *Sveda antologio* (1934) la pli granda parto de la poemtradukoj estas el ŝia plumo. Poste ŝi kontribuis al *Literatura mondo*, precipe en la jaroj 1936-37, tradukojn

el svedaj poetoj. Postmilite ŝiaj tradukoj aperis kolektite en la libro *Sveda poemaro* (1954). Sekvis kontribuado al *Norda prismo* (ekde 1955). Du el ŝiaj maloftaj, sed elstaraj originalaj poemoj aperis en *Esperanta antologio* (1958). Kelkfoje ŝi tradukis ankaŭ el la Esperanta poezio en la svedan.

Magda Bohman estis longe aktiva ankaŭ en KELI kaj aplikis sian tradukarton ankaŭ al himnoj: *Evangelia kantaro* (1952) kaj *Adoru kantante* (1971) konsistas grandparte el ŝiaj tradukoj. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj ofte subtenis la Asocion finance.

SCIENCA EVOLUO KAJ LA JARO 2000




La ese-konkurso anoncita en la aprila numero de nia revuo inspiris tre variajn verkojn, el kiuj la redakcio elektis kiel solan premiotan kaj publikigotan la ĉi-suban viglan prognozon de d-ro Henrik Maschler (Israelo). La aŭtoro evitas la tenton pritrakti ĉefe la lingvan problemon, kaj, kvankam li antaŭvidas gravan malaltiĝon de la kvalito de la homa vivo, li proponas je la fino ankaŭ pozitivajn paŝojn. La estonteco de la homaro — same kiel tiu de la Internacia Lingvo — ne estas garantiebla, sed ambaŭ estas ja influeblaj per racia laboro. Kiel premion d-ro Maschler elektis la Koranon.

HENRIK MASCHLER

Kiam la unua kosmonaŭto forveturis al la kosmo, venis ĵurnalistoj al lia domo por intervjui lian edzinon. Ŝi bedaŭrinde ne estis hejme. Ili renkontis nur la filon. La filo demandite pri siaj gepatroj diris. "Mia patro estas en la kosmo, li revenos post 86 minutoj. Mia patrino iris aĉeti viandon, mi ne scias, kiam ŝi revenos; dependas de tio, kiam oni alportos la viandon al la butikoj kaj kiom da aĉetantoj staras antaŭ ŝi en la vico."

Telefono deviga

La progreso: kiel bela vorto! Oni bezonas nur tiom da tempo por veturi al la luno, kiom antaŭ 200 jaroj daŭris la vojaĝo de Parizo al Amsterdamo. Ĉiu dua



homo havas aŭtomobilon en Usono; la telefono fariĝis jam deviga objekto en ĉiu loĝejo. La informa servo de radio kaj televido dum kelkaj sekundoj informas la tutan mondon pri la gravaj eventoj. La loĝejoj estas pli kaj pli komfortaj. Komputiloj servas grandajn organizaĵojn kaj fabrikojn; la turismo fariĝis jam ĝenerala atingo de ĉiu loĝanto de la progresiva mondo. Kion do atendi plu? Jes, multe estas atendinda. La loĝejoj fariĝos pli grandaj, la mebloj estos pli komfortaj kaj malpezaj. La telefono estos anstataŭita de telefonvidilo kaj ne bezonos dratojn por kunligi la interparolantojn. Ĉiu homo havos en sia poŝo malgrandan ilon, kiu permesos al li kontakti kun iu ajn homo, kiu en tiu momento estos al li bezonata.

La loĝejoj havos konstantajn temperaturon, malsekecon kaj lumon laŭ la deziro de loĝantoj. Ni vidos centojn da filmoj per nia televido laŭ nia elekto, sendepende, ĉu en tiu tempo ili estos dissendataj per la centra televiddissendilo. Ĉiu terglobo havos sian propran komputilon, kiu helpas al li, donante ĉiujn bezonatajn sciigojn kaj memorigante, kion li devas en la sama momento fari.

La veturiloj fariĝos pli rapidaj kaj komfortaj. La vojaĝo de Londono al Nov-Zelando daŭros 43 minutojn. Ekestos submaraj urboj kaj minejoj. Ekskursoj al la norda kaj al la suda poluso estos atingeblaj por preskaŭ ĉiu homo. Jam estos eltrovita rimedo kontraŭ la kancero kaj koratako, la infektaj malsanoj definitive malaperos...

Kiel bela futuro...! Sed...


La homoj fariĝos fremdaj

Samtempe kiam progresas la tekniko kaj la preciza scienco, ni ne vidas progreson de la sociaj sciencoj. Samtempe kiam la televido permesos al la homo aŭdi kaj vidi ĉiujn programojn de la tuta mondo, la plimulto de ili restos nekompreneblaj pro la manko de komuna lingvo. La ekskursoj al aliaj landoj limiĝos nur al rigardo de pejzaĝoj sen interparolo kun alilandanoj. La progreso de literaturo limiĝos pro la sama kaŭzo. Kontaktoj inter la homoj fariĝos pli kaj pli maloftaj. La homo havante sian komfortan loĝejon kaj ĉion, kion li bezonas, pli kaj pli malofte forlasos ĝin por interbabili. La infanoj ne bezonos eliri al la lernejo, ĉar la televidilo alportos al ilia loĝejo la plej bonajn instruistojn. Finiĝos la bela periodo de amikiĝo dum la jaroj de knabeco kaj juneco. La homoj fariĝos fremdaj unu al aliaj. Eĉ la ekzamenojn oni povos fari per iu interkomunikilo.

La teatro perdos sian signifon, ĉar perfektigita, stereofona kaj stereoskopa televidilo ĝin anstataŭos. Simile la koncertoj venos hejmen al la konsumanto. Eble ĝis tiu tempo ne estos solvita la problemo de laborloko, kiu troviĝos ekster la loĝejo.

Steloj malfacile videblaj


La aero fariĝos pli kaj pli malpura. La ĉielo ne estos videbla, ĉar la malpura aero donos grizan koloron al nia supro. Ankaŭ la steloj estos malfacile videblaj. La suno estos videbla, sed ĝi havos pli flavan koloron kaj ne brilos kiel hodiaŭ; simile la luno — nia romantika akompananto — fariĝos pli pala, kaj ĝia lumo estos anstataŭita de elektra lumo, kiu tiam eble atingos la forton de la nuntempa suno.



AŬTOMATIGITA VARTENEJO en Japanujo simbolas la gigantan ŝparon de homaj fortoj, kiun ĉiam pli ebligas la kombino de potencaj motoroj kun elektronika regado. Ĉi tiun staplon priservas unu sola homo, kiu per butonoj povas elpreni aŭ enmeti iun ajn keston.

Malaperos la arbaroj, restos nur tiuj, kiuj estas garditaj en naturaj parkoj. La akvo fariĝos malpura, la homaro estos en senĉesa vetkuro, ĉu venkos la purigado aŭ malpurigado de ĝi. La riveroj estos senfiŝaj, kaj oni ne povos naĝi en la riveroj kaj naturaj lagoj. Nur la basenoj restos por la naĝantoj. Ankaŭ la maro ĉe la bordo fariĝos malpura kaj malbonodora. La aero fariĝos pli kaj pli radioaktiva pro la kreskanta industrio. Ne estas certe, ĉu la homoj ĝis tiu tempo trovos rimedon por neniigi radiadon de industriaj restaĵoj. La kvanto de krudaĵoj malgrandiĝos evidente pro nia nuntempa abunda malŝparo. La nafto, kiun ni por nia plezuro forbruligas, fariĝos multekosta akiraĵo, kaj la homaro serĉos ion por ĝin anstataŭigi ne kiel brulaĵon sed kiel krudaĵon.

La fakto, ke la homoj atingis la planedojn, ne helpas al la homoj en la ĉiutaga vivo. La plenŝtopitaj stratoj kaj ŝoseoj, malgraŭ tre rapidaj veturiloj, fariĝos netrapaseblaj. Aperos milionoj da helikopteroj kaj aliaj personaj flugveturiloj, por anstataŭi aŭtomobilon, kiu ne estos uzebla en la grandegaj urboj. La urboj atingos la grandecon de nuntempaj ŝtatoj. Ili etendiĝos centojn da kilometroj kaj kuniĝos kun la urboj de alia lando. La homoj de unu antaŭurbo ne komprenos jam la lingvon de la homoj en la alia antaŭurbo. La domoj kreskos ĝis monstraj altecoj. 100 — ĝis 200-etaĝa domo ne estos maloftaĵo. En la centro de la urbo tiuj domoj aldone kovros la ĉielon. La malfacileco alporti la bezonaĵojn al la urbloĝantoj fariĝos la ĉefa problemo de la homaro. La infektaj malsanoj kaj kancero estos anstataŭitaj de la degeneraj kaj psikaj malsanoj. La nombro de invalidoj, kiu nun



H. Maschler

atingas 8%, tiam certe duobliĝos aŭ triobliĝos. La malsanulejoj tre moderne establitaj fariĝos ne sufiĉe rapide atingeblaj en la kazo de subita danĝero. Ankaŭ la aera transporto fariĝos ŝtopita per la denseco en la aero. Kolizioj en la aero fariĝos multe pli oftaj, ol hodiaŭ sur la ŝoseoj.

Krimoj plue kreskos

La belaĵoj de la naturo rapide malaperos. La bestoj estos forigitaj de la mondo; simile la birdoj. Ili restos nur en bestĝardenoj kaj eble en naturparkoj. La infanoj konos nur tiujn, kiuj tie restos vivantaj. Eble nur la hundoj kaj katoj al kutimigitaj al la vivo en la loĝejoj restos kiel solaj amikoj de la tiama homo. La ripozlokoj estos ankaŭ plenŝtopitaj. Ili atingos milionnombran ripozantaron, kaj ankaŭ tien la homo alportos la problemojn de la granda urbo. La nombro de krimuloj kreskos ĉiutage. La krimaj organizaĵoj transpasos ĉion, kio estas konata de nuntempa gangsterismo. Ĉiuj teknikaj rimedoj staros je dispono de tiuj organizaĵoj. Ankaŭ tio limigos kontaktojn inter la homoj.

Sed ĝi estas nur unu bildo de la estonta homaro. Je la alia flanko restos la plimulto de la homoj, kies nombro transpasos 7-9 miliardojn, malsataj kun ĉiuj malsanoj akompanantaj malriĉecon. Tiuj homoj, senigitaj de ĉiu havaĵo, kuŝos sur la stratoj ofte senmove atendante la proksimiĝantan morton. Plenŝtopitaj stratoj estos malfacile trapaseblaj, ĉar per ĉiu paŝo oni povos iun treti. Malespero, malsanoj kaj malsato faros el ili vegetantan materion sentaŭgan kaj senribelan. Nur la virinoj ĉiujare naskos novan kandidaton por la sama sorto.

En aliaj partoj de la mondo la afero aspektos iomete alie. La grupo de la reganta klaso povos facile per la modernaj iloj devigi la restaĵojn de la homoj labori por ĝi. La atingiĝoj de la moderna tekniko estos uzataj por krei sendubajn rimedojn kontraŭ supozeblaj ribeluloj. La moderna psikologio helpas al ili jam de juna aĝo lavi la cerbon, kio malpermesos al la simplulo eĉ pensi kontraŭ la akceptita socia ordo.


Bela futuro! Ĉu tamen estas iu eliro de tiu stato? Ĉu povas ĝin ŝanĝi nia generacio? Jes! Estas du rimedoj. La unua pli simpla: La totala nuklea milito, kiu likvidos ne nur la problemojn de la homaro, sed la homaron mem ĝis la lasta homo, inkluzive bestojn.

La dua: Evoluigi iomete la sociajn sciencojn kaj permesi al la homaro likvidi kelkajn problemojn. Likvidi la klasajn kaj la rasajn diferencojn. Ĉesi pretigi totalan militon kaj ankaŭ la konvencian. Forigi la religiajn antaŭjuĝojn. Ĉesigi kaŝan kaj malkaŝan sklavecon. Malgrandigi la naskiĝeksplosion. Ŝanĝi instrumentadojn en la lernejoj kaj la plej grave — montri al la homoj, ke la ĉefa atingiĝo estas amikeca kunvivo de la kunuloj kaj ne la komforto en la loĝejoj.

La homaro ne estas ĝis nun perdita, ĝi povas ion fari por sia estonteco, alie la nuntempa "krimo" kaŭzos mortpunon ne al la simpla homo sed al la tuta homaro.

La plej facila el tiuj rimedoj estas enkonduko de la internacia lingvo. Ĝi certe ne estas la ĉefa rimedo kontraŭ ĉiuj katastrofoj, sed ĝia sukceso montros, ĉu la homaro taŭgas kaj volas ion ŝanĝi en tiu terura estonteco, kien ni plirapidiĝante alproksimiĝas.

SURPRIZ-DONACO POR VIRINOJ



INTERNACIA KUIRISTINO: S-ino J. Shorter-Eyck en sia kuirejo, kie ŝi transformis en Esperantajn ingrediencojn receptojn el 100 landoj.

FLU-STILAJ SCIENCAJ FIKCIOJ

La aŭtoro d-ro
Konisi G.,
fizikisto



Recenzas Donald J. Harlow (Usono):

La kosmoŝipo "Edeno n-ro 5", de Konisi Gaku. Oosaka: Kansai-Ligo de Esperanto-Grupoj, 1971. 46 p. Mimeo. 21 cm.

Per serio da kvin noveloj — fakte du scienc-fikciaj noveloj, unu satira fantaziaĵo kaj du skizoj — s-ro Konisi Gaku prezentas al la esperantistoj du gravajn problemojn de la nuna epoko: la esploradon de la ekstera universo kaj la kreskantan superregon de la homo fare de lia teknologia civilizacio. La etoso de la verkaĵo ne estas gaja (sed vidu "La epokon de amaskonsumado") nek la prognozo optimisma (nur en "Kosmoŝipo").

Malgraŭ unu-du malglataĵoj la stilo estas flua kaj facile legebla. El pluraj neologismoj ne troveblaj en PIV (ekz. *braŭn'*, *konvej'*) nur unu — *fuel'* — ricevas klarigon. La ĉefa malfacilaĵo estas, ke la plej utila literatura formo por la scienca fikcio ne estas la novelo, sed la romano. La evidenta kapablo de la verkinto esperigas min, ke baldaŭ aperos en Esperanto tia romano.

Mendu ĉe UEA: 2,20 gld. (por Nederlando 2,29 gld.) + sendokostoj 10%.

Recenzas Ursula Grattapaglia (Torino):

La internacia kuir-libro Kompilis J. Shorter-Eyck. Londono: Brita Esperantista Asocio, 1971. 193 p. 21 cm.

Kiam oni vidas, ke libro pri kuirarto estas eldonita en Britujo, oni tuj fariĝas iom skeptika, ĉar ni ja scias, ke la brita kuirarto ne ĝuas favoran reputacion. Sed tiun opinion vi devas tuj ŝanĝi en nia kazo, ĉar nur 10% de la receptoj estas anglaj kaj la aliaj devenas el landoj kun fama tradicio en la kuirarto, kiel Francujo (30 receptoj), Ĉinujo (17), Italujo (16), Sovet-Unio (15), Hungarujo (15) ktp. Entute 100 landoj diversaj, el kiuj multaj tamen kun nur unu recepto. Ĉiuj dommastrinoj, ĉie en la mondo, havas la saman zorgon: Kion prepari por la venonta manĝo de la familio? Jen do valida helpo! Kaj se vi havas alilandajn gastojn — kia simpatia surprizo povi prezenti pladon konatan al ili. Sed atentu! Tion ne faru dum la unuaj 5 tagoj, ĉar certe la gastoj unue preferas konatiĝi kun la enlanda nova kuirmaniero.

Praktika formato, invitantaj elegantaj kovrilpaĝoj, moderna prezento, bonegaj sugestoj en la enkonduko.

Vere aĉetinda libro kiel jarfina surprizdonaco al esperantistinoj ĉie en la mondo.

Mendu ĉe UEA: 13,50 gld. (por Nederlando 14,04 gld.) + sendokostoj 10%.

UTILA POR PAROL-EKZERCO

Recenzas Elsa Otto (Hago):

Ni ludas teatraĵon de E.V. Tvarožek. Aabyhøj: Dana Esperanto-Eldonejo, 1971. 31 p. 21 cm.

Jen la kvara volumeto (31 paĝoj) en la "Serio de Gajaj Klubvesperoj".

Kun ĝojo mi tralegis la kvar unuaktaĵojn, kiuj laŭ stilo kaj enhavo certe estas rekomendindaj por prezentado en klubvesperoj.

"Nokta vizito" akiris en Belartaj Konkursoj la 3-an premion en 1969, "Koluma Maŝo", Laŭdan Mencion en 1970.

"Ĉe stratangulo" estas sprita legaĵo sed ne ludebla pro la revolverpafado, kiu devas kaŭzi verajn truojn! "Samsortanoj" (laŭ rakonto de O. Henry) estas bonega amuzaĵo.

Tamen ne nur amuzaj estas tiaj malgrandaj teatraĵoj, sed tre valoraj por paroligi komencantojn, kiuj post iom da ekzercado jam kapablos enkapigi kaj deklami jenajn simplajn frazojn el la ĉiutaga parolado.

Plua ekzerco estos trovi kelkajn tre maloftajn eraretojn.

Mendu ĉe UEA: 2,— gld. (por Nederlando 2,08 gld.) + sendokostoj 10%.

LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Ĉeĥoslovakujo

- Al Ĉeĥa-Slovaka Renkontiĝo, okazinta fine de septembro en Vsetín, partoprenis pli ol 300 ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj kaj gastoj el 7 landoj. Okazis kunvenoj de ambaŭ naciaj organizaĵoj ĈEA kaj AESSR.

Eŭropo

- En Antverpeno (Belgujo) okazos samtempe tri aranĝoj de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo 1972, nome Trilanda Renkontiĝo, 10a Markola Kongreso kaj 54a Belga Esperanto-Kongreso. (Informas s-ro J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg 1078, B-2710 Hoboken, Belgujo).
- De la 30a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1971 okazis en Jablonec n. Nisou (Ĉeĥoslovakujo) Internacia Renkontiĝo. Ĉeestis ĝin 160 personoj el 4 landoj: Ĉeĥoslovakujo, Germana Demokratia Respubliko, Hungarujo kaj Pollando. Inter la programeroj estis ankaŭ urbestra akcepto kaj gazetara konferenco, kiu

lasta rezultigis radio-elsendon favoran al la Internacia Lingvo.

Finnlando

- Pli ol cent Esperanto-studemaj finnoj kaj manpleno da servopretaj esperantistoj el aliaj landoj kontente travivis semajnon de Landa Esperanto-Tendumado, okazinta ĉi-somere en Sysmä apud lago Päijänne.

Francujo

- Regiona radio kaj gazetaro favore raportis pri la spektaklo, kiun dufoje prezentis en Roubaix A. kaj B. Tomecki. Krome, la semajna gazeto *La Semaine Polonaise* (Tygodnik Polski) aperigis du artikolojn pri la eŭropa turneo kaj la prezento dum la UK en Londono.

F.R. Germanujo

- Germana radio DLF (Köln) prezentis en siaj franc-lingvaj programoj komenton pri la nuna stato de Esperanto en FRG. La kroniko (7/10/71) finiĝis per la Esperantaj vortoj: "DLF salutas la esperantistojn."

Nederlando

- Kelkajn ekstraktojn el la 20 lecionoj de la televida kurso (dissendotaj ekde januaro 1972 en koloro) oni montros reklamcele en decembro 1971 en la televida kanalo "Nederland 1" por varbi kursanojn: en sabatoj (11a kaj 18a tagoj) de 11.00-11.30 h. kaj en mardoj (7a, 14a kaj 21a tagoj) post la lasta novaĵ-elsendo. La adreso de la televida institucio Teleac: Postbus 2414, Utrecht.

Usono

- Prezidanto Nixon proklamis en aŭgusto la jaron 1971 kiel "Jaron de Lingvaj Malplimultoj tra la Mondo." Li atentigis, ke pli ol du mil lingvoj ankorau ne posedas alfabeton aŭ skriban formon, kaj instigis ĉiujn apogi tiujn lingvistojn, kiuj laboras por krei skribajn lingvojn kaj tiel forigi la izolitecon de la koncernaj popoloj.

FAKE

Espermenso

- Espermenso, faka organizaĵo kunlaboranta kun UEA, okazigis kvalifikan teston per Esperanto. La teston partoprenis 6 personoj, el kiuj nur 2 sukcesis. Temas verŝajne pri la unuafoja uzo de Esperanto por serioza inteligento-testo.

Pacpremio

- S-ro Willy Brandt, gajninto de la ĉi-jara Nobel-pacpremio, kelkfoje ĝis nun esprimis sian simpatian kaj rekonon al Esperanto, ekz-e per salutoj al Germana Esperanto-revuo (1966) kaj al la 45a Germana Esperanto-Kongreso (1967).

PERSONE

Al-Amili

- S-ro Husen Mohamed Al-Amili, UEA-delegito por Bagdado en Irako, vojaĝante en Eŭropo utiligas Esperanton por sia komercado. En Pollando — i.a. per prelegoj — li vekis interesigon ankaŭ pri la Internacia Lingvo.

LASTE APERIS . . .

Apenaŭ bukedeto . . . (1971) Roger Bernard. 48p. 27cm. 5,10 gld. Mimeo. Poemoj tradukitaj el la franca literaturo (plus du originalaj). Poetoj klasikaj kaj modernaj.

Contro l'aggressione culturale dell'imperialismo per una cultura internazionale (1971) 164p. 17cm. 900 liroj. Mendebla ĉe 'Esperanto', str. Monte Nero 22, I-20135 Milano, Italujo. Itallingva diskuto pri Esperanto kaj revolucia politiko, kun gramatikaj klarigoj kaj vortaro Esperanta-itala.

Geriatrico kaj la ĝenerala zorgo por gemultjaruloj (1971) J.Th.R. Schreuder kaj A.Diatlowicki-Tobi. 43p. 22cm. 2,50 gld. Artikoloj de nederlandaj specialistoj, celitaj por flegistinoj.

Kalendaro 14 x 10 cm. Po 1,25 gld. por 10 ekz-oj (ne mendebla en pli malgrandaj kvantoj). Uzebla kiel poŝtkarto. Ĉiujare eldonata de Internacia Esperanto-Instituto. Kun kristanisma kaj zamenhofaj datoj.

Kremo de Kalocsay, La (1971) Elektajo el la poeziaj tradukoj kaj originaloj de K.Kalocsay. 56p. 23 cm. 3,50 gld. Eld. Bristola Esperanto-Societo, Britujo.

Poŝatlaso de la mondo (1971) 17 cm. 5,40 gld. 41 2- aŭ 3-paĝaj mapoj kun resumaj politikaj, geografiaj kaj ekonomiaj informoj pri la unuopaj landoj; 55-paĝa indekso. 12 000 geografiaj nomoj. Eld. Kartografie, Praha. Plurkolora preso, fortika bindaĵo.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

NASKIĜIS D.E.J. — DANA ESPERANTO-JUNULARO

Jam delonge multaj esperantistoj miris pri la fakto, ke Danlando, kvankam havante fortan plenkreskulan movadon, — CDEL (Centra Dana Esperantista Ligo), tute ne havis junularan sekcion.

Sed feliĉe pliboniĝis la situacio ĉijare: ekaktiviĝis tri junuloj el Selando: Helge Rørdam Olesen, nov-esperantisto el Kopenhago kaj la lernantoj Åge Skovrind kaj Simon Gjedde el Roskilde, ambaŭ filoj de konataj esperantistaj familioj.

Tiuj tri forsendis plurajn inform- kaj enketleterojn al ĉiuj danaj gejunuloj (scipovantaj la lingvon), krome ili informis aliajn interesitajn aŭ favorajn amikojn, i.a. proponante starigon de dana junulara sekcio esperantista. La rezulto estis nepre kontentiga: pli ol tri dekoj respondis pozitive kaj eĉ montris intereson eventuale partopreni semajnfinaĵajn aranĝojn kun la celo preparoli estontajn junularajn aktivecojn.

Tiel apogite en la agado niaj tri amikoj finfine decidis inviti ilin al du regionaj semajnfinaĵaj aranĝoj: fine de septembro kaj komence de oktobro, unu en Roskilde, la alia en Jutlando, proksime de Århus.

La unuan partoprenis dek unu junaj danoj kaj germana gasto, la duan dek tri personoj entute, inter kiuj kvin eksterlandaj esperantistoj; dum ambaŭ kunvenoj oni vigle diskutis, ĉu dana junulara sekcio estu fondita aŭ ne, kaj kiajn celojn kaj taskojn tia organizaĵo havu; iom post iom kolektiĝis tuta aro da proponoj, planoj kaj ideoj realigotaj:

Oni preparolis eblecon starigi tri servojn:


1. lingvan/informan servon, kun la celo informi ĝenerale pri tio, kie kaj kiel lerni Esperanton, respondi al lingvaj demandoj;
2. turisman servon, kun la celo informi pri eksterlandaj Esperanto-aranĝoj, okazigi internaciajn renkontiĝojn en Danlando, kunlabori kun Pasporta Servo (celanta junulinterŝanĝon internacian);
3. libran/libretan servon, kun la celo eldoni informfoliojn pri novaj libroj same kiel pri malmultekostaj libretoj, kaj eventuale ankaŭ forvendi malmultekostajn libretojn, se estos intereso.

Ankaŭ pri eblecoj ĝenerale kaj publike disvastigi Esperanton diskutiĝis aro da proponoj: flugfolioj, intervjuado surstrata, ekspozicioj, teatra grupeto, agado en gimnazioj, artikoloj en lernejoj kaj aliaj junularaj gazetoj kaj revuoj, pretigo de filmo pri labortendaroj kaj eldono de malmultekosta lernolibreto (senkoste disdonebla), ktp.

Evidente aro da bonaj kaj taŭgaj ideoj, — multaj taskoj kaj laboroj atendas niajn danajn amikojn, se ĉion ili volas realigi dum la sekvontaj jaroj!

Ni do ĉiuj esprimu niajn plej korajn gratulojn al ili okaze de la fondiĝo de D.E.J. (= Dana Esperanto-Junularo) kaj deziru al ili, ke ĉio, kion ili planas, realiĝu, kaj ke ili ne perdu sian freŝan entuziasmon!

Kiu interesiĝas pri pluaj informoj, rekte skribu al: s-ro Helge Rørdam Olesen, Engelvæjsvej 13, DK-2830 Virum, Danlando.



DEJ-aktivuloj okaze de la kunveno en urbo Aarhus. La kvara de maldekstre: s-ro G.D. Winkler, nova TEJO-redaktoro. Fotis mankanta aktivulo Helge Rørdam Olesen.

6-A SEMINARIO POR GVIDANTOJ

“La 6a Seminario por Gvidantoj (ne-esperantistaj) okazis de la 29a de aŭgusto ĝis la 4a de septembro. Tridek gejunuloj kaj kvarpersona stabo travivis emocion semajnon en la Eŭropa Domo de Sijsale, kastelo apud Bruĝo, Belgujo,” tiel raportas s-ro Hans Bakker, ĉiam aktiva iama ĉefo de la NEJO-komisiono de TEJO.

Sekvas bona, detala raporto pri tio, kio okazis tiam tie. Interalie li skribas:

“La entuziasmo estis tiel granda, ke unuanime oni decidis rekunveni dum semajnfino en oktobro; — ĉiutage laborvolaj protokolantoj verkis raportojn, kaj krome de tempo al tempo aliaj individuoj kaj grupetoj insistis aldoni proprajn raportetojn, ĝis malfrue nokte oni trovis obstinajn tajpantajn, multobligantajn kaj redaktantajn grupetojn en la kastelo.”

“El 30 partoprenantoj du estis (lastmomente aliĝintaj) esperantistoj: germano kaj franco. La aliaj estis nederlandanoj (24) kaj belgoj (4). Multe pli bona estus proporcio 10-10-10. La konsekvenco nun estis, ke Esperanto ne havis utilan sed ĝenan rolon en la kurso. Nur la valoraj kontribuoj de la franco kaj germano kaj ilia bonvola adaptiĝo al la cirkonstancoj evitigis problemojn. La grupo plene akceptis ilin kiel grupmembrojn kaj klopodis malpliigi la lingvajn malfacilaĵojn. Ĉe la fino regis sufiĉa interesiĝo pri Esperanto. Multaj portis hejmen materialon pri TEJO kaj pri la kurso *Esperanto programita*. La raporto aperos en la nederlanda lingvo kun Esperanto-resumo.”

Leginte la raporton pri la Seminario oni eble perdas iluzion pri grandetosa sukcesa aranĝo, celanta kontribui al fortikiĝo de TEJO. Ĉar jen la vero: okazis tia aranĝo, partoprenis ĝin trideko da personoj, junaj, viglaj kaj aktivaj, — kaj kio eltroviĝis? Montriĝis, ke Esperanto havis ĝenan rolon, pro la ĉeesto de la du solaj eksterlandaj esperantistoj*.

La aranĝo laŭ programo ja devus esti — same kiel la



KONSILOJ AL VOJAĜONTOJ

57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon, Usono.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Survoje al Portland

Kanadaj esperantistoj invitas al partopreno en la 14-a Kanada Kongreso de Esperanto en Victoria, B.C., la 24an, 25an kaj 26an de julio 1972. La 27-an okazos komuna veturo al Portland. Informas: K.K. de Esperanto, 1712 Haultain St., Victoria, B.C., Kanado. Ĉi tiu komunikado samtempe nuligas la anoncon pri Antaŭkongreso en Vancouver, aperintan en la juli-aŭgusta numero, p. 136.

AVIADILA KARAVANO AL PORTLAND

Ire-revene la karavano transportos vin je nur 980,— gld. de Amsterdam ĝis Portland (Oregon), distanco duoble pli longa ol ĝis Novjorko! Forflugo: 1972-07-26; reflugo: 1972-08-18, ev. el San Francisco.

Neniam pli malmultekoste vi povos viziti la Pacifikon! Eĉ se vi loĝas iom okcidente de Nederlando, valoras unue veturi al Amsterdam por fari de tie la salton al Portland. Al la vojaĝo ne estas ligita difinita hotelo. La restadon vi povos mem aranĝi tiel pli aŭ malpli koste kiel vi deziras, ĉu en hotelo, studenta loĝejo aŭ ĉe amikoj.

Ĉiujn pliajn detalojn petu de f-ino M.H. Vermaas, komisiito de UEA por specialaj taskoj, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002. Tel. (010) 36 45 42.

etoso — ege bonkvalita. Certe, ion ni devas fari pri tia problemoj (ĉu vere ni tiel mortigu taŭĝan ĉiujaran aranĝon?). Jen la demandoj al vi ĉiuj: (1) Ĉu tute stultas okazigi tiajn seminariojn por gvidantoj? (2) Ĉu estas maloportuna la tempo de la jaro? (3) Ĉu maloportunas la loko/lando? (4) Kion ni povas fari por la venontaj Seminarioj por Gvidantoj?

Ĉiuj, kiuj ŝatus aŭ pretus iel esprimi sian opinion rilate al tia problemoj, ĉu kritikante, laŭdante aŭ proponante ion novan, bonvolu skribi rekte al la redaktoro George D. Winkler (adreso supre).

* Flandraj belgoj kaj nederlandanoj parolas preskaŭ la saman lingvon.

Vigla stando en Londono

Usonaj partoprenantoj en la londona kongreso alterne deĵoris ĉe la ĝiketo de la 57-a UK Portland. Ilia diligenta laboro rezultigis kelkdekon da tujaj aliĝoj. Disdonitaj estis multaj reklamiloj, i.a. pri la postkongreso en San Francisco.

Portland Hilton = komforto kaj lukso

Malofte oni povas labori kaj loĝi dum la Universala Kongreso en unu sama konstruaĵo. La 57-a proponas ĝuste ĉi tiun avantaĝon!

Hotelo Hilton en Portland kun siaj 500 diverskategoriaj loĝoĉambroj (ekipitaj per radio, TV, telefono, aŭtomata klimatiso k.a.), multenombraj kunvenejoj kaj salonoj, varmakva banbaseno, saŭno, garaĝo kaj pluraj aliaj modernaj instalaĵoj atendas esperantistajn gastojn, al kiuj ĝi donos apartajn favorojn, i.a. senpagan kongresejon.

Usona vizo

Kun la escepto de civitanoj de Kanado, ĉiuj aliaj ŝtatanoj bezonas enirvizon por viziti Usonon. Necesaj dokumentoj: plenigita formularo, valida pasporto, fotografiaĵo kaj la "atesto pri intenco forlasi Usonon post kelktempa vizito". La vizo-petojn pritraktas ĉiuj vizo-fakoj de usonaj ambasadoj kaj konsulejoj. Vakciniĝo kontraŭ variolo ĝenerale ne plu estas postulata.

Minimumigu la vojaĝkostojn

Lastatempa anonco pri malaltigo de transatlantikaj tarifoj de flugkompanioj, diversaj rabatoj kaj karavanaj vojaĝoj prezentas vastajn eblecojn por efektivigo de la kongresvizito je konvenaj prezoj. Volonte informas ĉiu komerca agento de flugkompanio. Pri la karavanode UEA oni kontaktu kun f-ino M.H. Vermaas, komisiito por specialaj taskoj de UEA (Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando).

Junulara Konferenco en Portland

Por la IJK de TEJO 1972 akceptiĝis la invito de Pollando. Dum la UK en Portland okazos tritaga konferenco de TEJO, kaj oni diskutos ĝenerale pri la samaj temoj kiel en la IJK. Antaŭvidita estas komuna loĝado en la Universitato. Kiu deziras helpi aŭ informiĝi, turnu sin al Guy Matte, 214 Gloucester, app. 7, Ottawa, Kanado.

Statistiko (25 oktobro 1971)

Argentino 2, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 2, Belgujo 3, Brazilo 1, Britujo 11, Bulgarujo 6, Ĉeĥoslovakio 3, Danlando 4, Finnlando 8, Francujo 27, F.R. Germanujo 16, Grekujo 3, Hispanujo 3, Hungarujo 5, Israelo 1, Italujo 11, Japanujo 13, Jugoslavio 4, Kanado 11, Koreujo 3, Madagaskaro 1, Meksiko 3, Nederlando 22, Norvegujo 4, Nov-Zelando 2, Peruo 1, Pollando 6, Portugalujo 1, Svedujo 17, Svislando 4, UAR 2, Usono 40.


Entute aliĝis 244 personoj el 33 landoj.

vi simple ne po

Homo ne povas esti malaktiva. Tute egale, ĉu li kreas por kontentigi artisman bezonon aŭ okupiĝas pri industriaj aŭ mastrumaj aferoj, li ne povas ĉesi labori. Malmultaj volas. Sed okdek-jaruloj scias, kiom ŝanĝiĝis la karaktero de la laboro. Industriaj entreprenoj ankaŭ memoras, kiom evoluis laborkondiĉoj. Unu el tiuj entreprenoj estas Philips. Fondita en 1891, la kompanio havis la privilegion kontribui al tiu teknika disvolviĝo per ampleksa sortimento da industriaj produktoj, ekde veldiloj ĝis elektronikaj mezur-instrumentoj, de integritaj cirkvitoj ĝis fermit-cirkvita televido. Philips ankaŭ provizas hospitalojn per X-radiaj kaj medicinaj aparatoj, tiel ebligante al multaj, kiuj alie estus nelaborpovaj, repreni sian lokon en la homa komunumo.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips

PHILIPS



vas c'esi labori.



P. V. Bagger

Vojaĝ-informa Servo kaj turismo

Skribas P.V. Bagger (Danlando):

La alloga forto de la pli kaj pli multnombraj internaciaj Esperanto-aranĝoj estas nesufiĉe utiligata pro manko de fidinda, ampleksa, profesinivela informado. Forta, centra Vojaĝinforma Servo povus solvi la problemon.

SPERTOJ

Kiel gvidanto de kursoj por gimnazianoj mi plurfoje konstatis, ke nia movado ne posedas multe da allogaĵoj por junuloj. Ne estas prudente menciigi "membrecan", kaj la Delegita Reto, kiu laŭ la Jarlibro estas "unika en la mondo", bedaŭrinde neniel estas unike alloga por la kursanoj.

Sed pasintjare SIS (Skandinavia Internacia Somerlernejo) sendis 8000 junulojn al feriokursoj pri la angla, franca kaj germana lingvoj. Tio estas kresko de nulo ĝis ok mil en ses jaroj kaj sekve montras al fekunda kampo.

Ankaŭ TEJO kaj aliaj aranĝas feriokursojn kaj labor-tendarojn diversloke, kaj mi decidis prezenti niajn aranĝojn al la kursanoj.

Sed tio ne estis simpla afero. Post tralegado de pluraj gazetoj mi sukcesis kolekti tre supraĵajn informojn pri aro da aranĝoj. Samtempe mi skribis al la diversaj lokoj por havi detalajn programojn. Kelkaj tuj respondis, sed aliaj nur post unu aŭ du monatoj.

Kaj la programoj, kiuj alvenis, ne estis imponaj. Kelkaj estis malgrandaj slipoj kun nesufiĉaj informoj, ekz. sen indikoj pri aĝlimo kaj loĝebleco. Tion mi mencias ne por kritiki, sed nur por konstati, ke ofte la aranĝantoj, pro la praktikaj farendaĵoj surlokaj, ne havas sufiĉe da kroma forto por efika internacia informado. Krome ne multaj kursgvidantoj volas fari tion da skribado por povi prezenti materialon al la kursanoj.

Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar malgraŭ la primitiva materialo, malfacile kaj parte malfrue havebla, pluraj junuloj de mia kurso, kaj ankaŭ aliloke en la lando, interesiĝis kaj aliĝis, kaj tio pozitive influis la kurson.

PROPONO

Mi juĝas, ke profesinivela Vojaĝinforma Servo en la daŭro de kelkaj jaroj povus fariĝi kerna elemento en nia internacia vivo.

Jen la ĉefaj trajtoj de plenevoluinta Vojaĝinforma Servo (VS): VS estu fako de la Centra Oficejo de UEA.

Tri fojojn jare VS eldonu modernaspektan allogan katalogon de labortendaroj, feriokursoj, festivaloj, kultursemajnoj, skisemajnoj, kongresoj ktp. sur bona papero, kun koloroj kaj kun bildoj.

Aperdatoj povus esti la 1a de februaro, la 15a de aprilo kaj la 15a de oktobro, kun detalaj programoj laŭsezono.

La katalogojn oni sendu senpage al individuaj membroj. Landaj Asocioj povus je malalta prezo aĉeti ekzemplerojn por ĉiuj lernantoj kaj kursanoj en la lando.

La aranĝantoj povus je malaltaj prezoj mendi duonan paĝon, tutan paĝon aŭ du paĝojn da anoncoj en la katalogo. Por ke la informoj estu kiel eble precizaj, fidindaj kaj sufiĉaj, la aranĝantoj devus respondi je tre detala enketilo.

SEKVOJ

La instruado fariĝus pli vigla kaj interesa, ĉar la kurso povus okupi sin pri aktualaj turismaj tekstoj i.a. kun proponoj interesaj por junuloj.

La informado fariĝus pli efika kaj natura, ĉar oni povus montri la katalogojn al neesperantistaj amikoj: "Ĉu vi ne kunveturos? Estos kurso por komencantoj tie!". (Eĉ la mizera materialo, kiun mi disdonis, havis tiun efikon — kiom pli, se temus pri alloga katalogo?).

Pli fruaj informoj pri multaj aranĝoj, ĉar la aranĝantoj certe — se iel eble — volus reklami jam sufiĉe frue en la katalogo.

Pli sukcesaj aranĝoj, ĉar venus pli da partoprenantoj.

Pli da aranĝoj, ĉar la aranĝantoj ne plu amatornivele devus peni informi, sed povus uzi profesinivelan efikan malmultekostan kanalon.

Membreco de UEA fariĝus pli alloga.

FINANCADO

Ĉar la katalogoj nepre ne estu mizeraj, la eldonado certe ne donus profiton. Se necesus ŝpari el jam ekzistantaj agadoj, mi montrus al la Delegita Reto. Ĝi kostas al ni inter 10 000 kaj 15 000 gld. jare, kaj ĝi postulas ne malgrandajn administrajn fortojn.

Se rezigno je la unua parto de la jarlibro ĉiun duan jaron povus financi la Vojaĝinforman Servon, mi pensas, ke tio estus fruktodona interŝanĝo.

Skribas Nikola Nikolov (Sofio):

La internacia turismo estas unu el la plej gravaj fenomenoj de nia epoko. Oni diras ke pli ol 200 milionoj da homoj ĉiujare ekskursas al eksterlando. La esperantistoj ofte vojaĝas alilanden. Por memstare vagi tra eksterlanda urbo oni bezonas mapon de ĝi kaj Esperanto-nacilingvan frazaron. Irante en iu ajn lando, mi nepre aĉetas frazaron. Ĝi kaj la mapo tre bone servas al mi.

Tamen ne en ĉiuj landoj kun relative disvolvita Esperanto-movado oni zorgas, ke estu aĉeteblaj; mapo de la urbo kun klarigoj en Esperanto kaj Esperanto-nacilingvaj frazaroj. Ekzemple en Bulgarujo de antaŭ ses jaroj ne aperis nova frazaro. La en 1963 aperinta jam malaktualiĝis, kaj krom tio ĝi estas aĉetebla nenie. Nun la bulgara sekcio de la asocio "Monda Esperanto-Turismo" klopodas, ke la ŝtata eldonejo "Nauka i izkustvo" eldonu ampleksan frazaron. Ni esperas venki ĉiujn obstaklojn, por ke ni havu antaŭ la okazigo de nia landa Esperanto-kongreso (en la komenco de julio 1972) novan frazaron.

Estus bone, se oni ekklopodus en ĉiuj landoj, almenaŭ eŭropaj, por ke ni havu frazarojn.

Krei lingvan komisionon por manuskriptoj

Skribas Albert Lienhardt (Francujo):

Sekve al la propono aperinta en la artikolo "Didaktika literaturo, en Esperanto laŭeble simpla" (*Esperanto* n-ro 764, p. 116-118) organizi sisteman kontroladon de manuskriptoj kaj presprovaĵoj, relative multaj legantoj reagis per aproba respondo.

Tial ŝajnas dezirinde, ke UEA kreu specialan fakon (kaj varbu kompetentajn fakdelegitojn) pri "Lingva kontrolo de manuskriptoj". La taskoj de tiuj fakdelegitoj devus esti la jenaj:

- 1) lingve kontroli artikol-projektojn kaj libro-manuskriptojn, en atento al la ĉefaj *kriterioj pri simpla Esperanto*, formulitaj en la ĉi-supre menciita artikolo "Didaktika literaturo";
- 2) rekomendi al redaktoroj, artikol-verkantoj kaj aŭtoroj de libroj uzi laŭeble simplan stilon, por *faciligi* kaj *agrabligi* al komencantoj kaj progresantoj la lernadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
- 3) kontroli la pres-provaĵojn de aperontaj artikoloj kaj libroj (precipe de legolibroj por lernantoj), por

eviti pres-erarojn ankoraŭ tro ofte troveblajn en Esperanto-publikigaĵoj.

Principe, la koncernaj fakdelegitoj konsentu plenumi la servo-petojn pri lingva kontrolado senpage (aŭ kontraŭ donace sendotaj libro-ekzempleroj); sed la servo-petantoj kompensu la elspezojn por afranko k.a.

En landoj, en kiuj troviĝos pluraj fakdelegitoj tiuspecaj, povos esti utile krei "Landan komisionon por lingva kontrolado de manuskriptoj".

Respondas la redakcio:

La servoj de tiaj fakdelegitoj povus esti efektive tre utilaj. Tamen unu danĝero estas evidenta: ke povus enoficiĝi personoj kun neadekvata lingvoscio. Ĉar la delegitojn nomas plejparte la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj, estus ilia tasko rigore kontroli la kvalifikaĵojn, ekzemple surbaze de ekzamen-diplomoj. Ni povas akcepti tiun novan fakon, eksperimente. Kandidatoj bv. turni sin al la landa asocio aŭ ĉefdelegito.

Alia ordigo por la delegita listo?

Skribas Brian D. Kaneen (Kanado):

1) Ĉu en la 1972-a Jarlibro estus eble ordigi la delegitajn nomojn de grandaj landoj (mi parolas precipe pri Usono) ne nur alfabeto, sed alfabeto *laŭ ŝtatoj/provincoj*? Transveturante la kontinenton, oni devas nun ĉiam denove tralegi la tutan liston, por ekscii, ĉu fakte estas delegito ie en la tiutage transveturata ŝtato.

2) Kiam vi presas informojn pri nordamerikaj urboj, bv. nepre *ne* forlasi indikon pri la ŝtato/provinco. Ekz. en CED dokumento G/V/17 (a-e) pri E-elsendoj en 1970 mi legas, ke ankaŭ "Columbus (Usono)" disaŭdigas programojn en E-o. Mia (cetere ne tro granda) atlaso katalogas *dek* urbojn en Usono, kiuj portas tiun nomon!

Respondas la redakcio:

1) Ĝuste la saman proponon jam faris usonaj membroj al la Centra Oficejo. Ni tamen ĝis nun hezitas alpreni tiun proponon, komparante la malgrandan kreskon de utileco kun la granda kresko de la laboroj rilatantaj al la preparo de la listo kaj al ĝia daŭra renovigo.

Ne eblas alpreni la proponitan sistemon nur por Usono. Ni timas, ke unu sola precedenco kaŭzos postan lavangon. Intertempe de Belgujo venis la sama propono por Belgujo mem. Kion opinias aliaj, kaj kia pli bona propono povas ekzisti?

2) Prave.

Kiel varbi apogantojn por krei vastan prem-movadon?

Skribas Gottfried Hofstätter (Aŭstrujo):

Krom nia bonega lingvokultura flanko ni urĝe bezonas ankaŭ fortegan, kunordigitan batal- kaj prem-movadon. Kiel krei ĝin? Memkompreneble ni devas persiste daŭrigi la jaman agadon, sed krome ni devas varbi en ĉiuj landoj amason da neesperantistoj – "Esperanto-amikoj" – kiuj ĉiujare pagu kotizeton por la afero. Kompreneble ili nepre estu akurate provizataj per minimume kvaronjaraj bonaj informfolioj en la koncernaj naciaj lingvoj.

Respondas la redakcio:

Siatempe UEA lanĉis mondan kampanjon por havigi al si grandan nombron da "Apogantoj", kiel ebligas art. 12 de la Statuto. La kampanjo ne donis kontentan rezulton. Kiel prave emfazas s-ro Hofstätter, tia varbado postulas bonajn, speciale verkitajn informilojn en ĉiuj koncernaj naciaj lingvoj, kiujn poste kompletigus regulaj bultenoj. Pro tio ĝi pli apartenas al la landa nivelo de agado, kaj efektive en kelkaj landoj (ekz. Aŭstrujo, Vjetnamujo) io estas atingita en tiu direkto.

FUTBALO

El ĉiuj branĉoj de sporto, futbalo (aŭ: pied-pilk-ludo) estas verŝajne la plej populara, almenaŭ en Eŭropo kaj en Sud-Ameriko. Kelkaj aliaj sportoj, kiuj ĝuas tre altan gradon de populareco, estas ekzemple: teniso, tablo-teniso, hokeo kaj glaci-hokeo, basbalo, rugbeo, skermo, remado, naĝo kaj tiel plu.

Sed estas *nekontesteble*, ke en multegaj landoj, de la plej varmaj ĝis la plej malvarmaj, futbalo estas la favorata ludo de la popol-amaso.

Futbal-*teamo* konsistas el dek unu ludantoj, kiujn oni *kolektive* indikas per "dekunuo". Unu el tiuj ludantoj estas la golulo, kiu havas sian lokon en la golejo. Lia tasko estas eviti, ke la pilko, kiun la kontraŭa partio klopodas pafi en la celon, transpasu la golan linion. La golulo estas la *ununura* en la teamo, kiu rajtas tuŝi aŭ kapti la pilkon per la manoj.

Moderna futbal-dekunuo normale ludas laŭ la pozicio 4-2-4. Tio signifas, ke 4 ludantoj formas la *arieron* (ili nomiĝas "arieruloj"). Ili ludas en la malantaŭa aŭ defenda linio. La mezon okupas 2 ludantoj kaj ilin oni nomas "mezuloj". Ili troviĝas inter la ariera kaj la *avana* linioj. En la antaŭa aŭ ataka linio ludas 4 avanuloj, kies ĉefa tasko estas ataki la golejon de la kontraŭa partio. Ili daŭre klopodas trabori per la pilko la celon de la alia partio.

Se ludanto sukcesas *piede aŭ kape* enpafi la pilkon en la golejon, oni diras, ke li trafis la celon aŭ "faris golon".

Grandnombre alfluas la publiko, kiam du fortaj kaj konataj teamoj sin renkontas sur la futbal-tereno. Ĝi *spektas* kun streĉita atento la sportan manifestacion. La ludon mem oni povas nomi 'spektaklo', kaj ofte *dekmi*loj da spektantoj spektas la spektaklon.

La oficiala daŭro de futbal-konkurso — ankaŭ nomita 'matĉo' — estas naŭdek minutoj. Post kvardek kvin minutoj la *arbitracianto*, per sia fajfilo, interrompas la ludon dum kvaronhoro. Post tiu dekkvin-minuta paŭzo la du teamoj daŭrigas la matĉon. La teamo, kiu pli multe trafas la celon, *piedpuŝante aŭ kappuŝante* la pilkon en la golejon, gajnas la konkurson.

Klarigoj:

ne-kontest-ebl-e: tiel, ke oni ne povas kontesti, ke oni ne povas pridubi aŭ kontraŭ-argumenti, absolute, sendube.

teamo: grupo de ludantoj, precipe en sporto. La spirita atmosfero, kiu regas en la grupo, nomiĝas la "teama spirito".

kolektive: kune, sub unu komuna nomo.

unu-nur-a: sola, sol-sola, unika.

ariero-n: malantaŭo-n (en sporto, arier-ulo estas normale tiu ludanto, kiu troviĝas plej malproksime de la kontraŭa partio.)

avana: antaŭa (en sporto, avanulo ludas normale kiel atakanto en la unua linio). Komparu ankaŭ: avangardo, avangarda, avangardisto, avangardismo.

piede aŭ kape: per la piedo(j) aŭ per la kapo. Komparu similajn adverbajn formojn, ekzemple: buŝe komuniki, fingre montri, piedfingre iri, okule observi, mane tuŝi, lipe laŭdi (= ne sincere, ne elkore).

grand-nombr-e: en granda(j) nombro(j), amase.

spekt-as: spekti = atente rigardi tion, kion oni prezentas.

KELKAJ PRINCIPOJ

Por eviti polemikojn, mi respondos kiel eble plej koncize al la kvinpaĝa artikolo de prof. Lapenna, kiu aperis en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto." La celo de la subaj linioj estas nur reliefigi kelkajn principojn. La esperantistoj, kiuj deziras pli da detaloj pri apartaj punktoj, prefere sin turnu private al mi. Al ĉiuj mi sugestas legi miajn artikolojn en "Heroldo" kaj kompari ilin kun la respondo de la prezidanto de UEA antaŭ ol formi al si opinion pri la tuta afero.

1) La aŭtoro skizas pri "Heroldo de Esperanto" nur negativan bildon kaj montras la gazeton nur kiel supozitan portanton de atakoj kaj misprezentadoj kontraŭ UEA; li *prisilentas ĉiun pozitivan elementon de la gazeto*, nome ke "Heroldo":


a) plurfoje substrekis, ke UEA estas la sola nepre apoginda komuna asocio de ĉiuj esperantistoj (tion la subskribinto ree deklaris dum la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA en Londono);

b) ĉiam raportadas tre amplekse — kaj ofte kiel unua — pri ĉiuj iniciatoj de la Estraro de UEA (Institucio Hodler '68, Semajno de Internacia Amikeco,

ktp) kaj dediĉas al la kongres-urbo kaj al la Universala Kongreso de UEA — jam de kelkaj jaroj — duoblan numeron (Por la londona kongresa numero, "Heroldo" eĉ dungis tri kromajn redaktorojn);

c) aperigis *kaj* laŭdajn artikolojn pri la agado de la Estraro (Ekzemple: tri tiaj aperis en la maja numero) *kaj* artikolojn, en kiuj troviĝas laŭdoj kaj kritikoj kune. *La kritikoj neniam estis direktitaj kontraŭ UEA kiel institucio*, sed kontraŭ kelkaj agoj aŭ la ag-linio de la pasintaj Estraroj aŭ de individuaj estraranoj. Ĉiam estis substrekita la principo de tutmovada kolektiva respondeco pri faritaj eraroj kaj estis proponitaj solvoj al la problemoj. Do, temis pri konstruaj kritikoj ne kontraŭ personoj, sed kontraŭ ideoj. Tiaj kritikoj estas sanaj kaj necesaj en demokrata movado. Oni devas, aliflanke, distingi inter UEA kaj ĝiaj Estraro kaj estraranoj.

2) La aŭtoro ne mencias, ke — ekde Pentekosto 1969 — "Heroldo" sendas ĉiujn artikolojn pri UEA, *antaŭ ilia publikigo*, al vic-prezidanto de UEA, s-ro E.L.M. Wensing, por opini-esprimi, kvankam "Heroldo" scias, ke s-ro Wensing ne estas oficiale komisiita de la Estraro de UEA flegi la kontaktojn inter ĝi kaj "Heroldo". S-ro Wensing neniam trovis en ili atakojn aŭ misprezentadojn kontraŭ UEA (kun la sola



spektas ion, estas spektanto, Komparu: Mi trovas la filmon nespektinda = Mi trovas, ke la filmo ne meritas, ke oni vidu ĝin = La filmo ne indas esti spektata.
dek-mil-o-j: pluroble 10 000 (= plurajn fojojn 10 000).
homoj loĝas en tiu ĉi urbo; cent mil homoj loĝas en la urbo.
arbitraci-ant-o: en ludo, la arbitracianto estas neŭtrala persono, kiu ne kunludas, sed kies tasko estas atente observi la ludantojn de ambaŭ partioj kaj haltigi la ludon ĉiufoje, kiam iu ludanto misaplikas la regulojn de la ludo. La arbitracianto ankaŭ havas la rajton puni.
pied (kap)-puŝ-ant-e: puŝante (la pilkon) per la piedo(j) aŭ per la kapo. Komparu: kapjesi, flugilklaki, manpremi, piediri, pugnofrapi, ktp.

PROVERBOJ

Ĉiu nacia lingvo posedas proverbojn. Ofte iliaj devenoj estas malfacile rekoneblaj, ĉar multaj estiĝis jam antaŭ jarcentoj, kiam la kutimoj, moroj, metioj, cirkonstancoj kaj viv-manieroj de la popoloj estis tute aliaj ol hodiaŭ. Multaj naciaj proverboj tute ne estas tradukeblaj aŭ, se oni tradukus ilin laŭvorte, ili estus absolute nekompreneblaj por alilingvanoj. Tamen, modesta uzo de trafaj proverboj povas efike helpi por plivigli la konversacion aŭ la prozon. Zamenhof mem diris, ke estas necese koni proverbojn por perfekta konado de la lingvo. Tial li, post tre zorgema esplorado de la proverbo-trezoro en pluraj naciaj lingvoj,

kompilis ankaŭ por Esperanto, grandan kaj riĉan kolekton da proverboj.

El tiu kolekto, kiu nomiĝas "La proverbaro de Zamenhof", sekvas nun kelkaj ekzemploj.

Vi nun provu trovi en via lingvo *ekvivalenton*, t.e. proverbon, kiu havas pli-malpli la saman sencon kaj la saman signifon. Ĉar Esperanto estas internacia lingvo, estas kompreneble, ke la proverboj en Esperanto, kvankam trafaj kaj esprim-riĉaj, devas esti internacie kompreneblaj; idiomaĵoj, kiuj estas propraj al iu lingvo aŭ lingvo-regiono, fakte ne ekzistas, ne povas ekzisti en nia lingvo. Vi ĉiam pri-atentu tion, tradukante el via propra lingvo, ĉar via lingvaĵo fariĝus tute nedeĉifrebla, se vi tradukus laŭvorte el via gepatra lingvo en Esperanto. Iom da idiotismoj troviĝas ankaŭ en Esperanto, sed ili estas tre maloftaj, kaj prefere vi ankoraŭ ne okupiĝu pri ili.

"Akvo trankvila estas akvo danĝera."
"Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras."
"Al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas."
"Ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj."
"Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan."
"Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn."
"En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas."
"Forĝu feron, dum ĝi estas varmega."
"Al la papero ne mankas tolero."
"Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko."
"Mankas klapo en lia kapo."
"Pri gustoj oni disputi ne devas."

Klarigoj:

deveno: origino. Tiu vorto "venas de" la greka lingvo, do ĝia de-veno estas greka. Proverbo: Mono odoron ne havas, sian devenon ne diras.
ekvivalento: de egala valoro, de sama signifo, sinonimo.
en-ter-ig-it-o-j: personoj mortintaj kaj metitaj en tombojn (igi en la teron = enterigi). Komparu ankaŭ: meti en akvon = enakvigi; meti sur paperon = surpaperigi, ktp.

escepto pri la rimarko rilate al la subteno, kiun la Estraro donas al TEJO), sed nur ne-ofendan esprimon de opinio.

3) La aŭtoro ne mencias, ke el ok estraranoj li mem kaj kvar aliaj estraranoj aprobis publikigi la julian-aŭgustan artikolon, sed tri tion malaprobis kaj eĉ firme kritikis.

4) La aŭtoro ne publikigas sian respondon en "Heroldo" — kiel estus normale kaj kiel tiu ĉi gazeto oficiale proponis la 15-an de junio — sed en "Esperanto", kies legantoj ne konas la de li responditajn artikolojn.

Kiel prezidanto de la Societo "Heroldo de Esperanto", mi deziras aldoni, ke ne ekzistas konflikto inter UEA kaj "Heroldo", sed nur malsimileco de opinioj inter prof. Lapenna kaj mi pri la vojoj de nia movado.

G.C. Fighiera
Dumviva Membro de UEA

Precizigo de la prezidanto

1. La aŭtoro de la supra teksto ne sukcesis kontesti unusolan fakton, aŭ analizon bazitan sur faktoj, en la koncerna artikolo, kiun mi verkis laŭ la unuanima decido de la Estraro (unu estrarano ne ĉeestis), farita dum la aprila kunsido. La komisiita tasko ne estis "skizi" kian ajn bildon pri "He-

roldo", sed refuti antaŭ la membraro gravajn misprezentojn de tiu gazeto pri UEA. La multnombrajn personajn insultojn de la lasta jardeko mi ignoris kaj plu ignoras. Reagi je ili estus profunde sub mia digno.

2. La verkinto de "Kelkaj principoj" sciigis, tute kontraŭregule, unue pri la aprila decido de la Estraro kaj poste eĉ pri la teksto de mia artikolo longe antaŭ la apero de la julia/aŭgusta "Esperanto", kaj klopodis per tre senprincipaj metodoj, inkluzive minacojn, malebligi ĝian publikigon. En tiaj kondiĉoj la 8 estraranoj, leginte la tekston, aprobis per 5 voĉoj kontraŭ 3, ke la artikolo aperu sensanĝe. Neniel temis pri kia ajn "kritiko" de la enhavo, sed esence pri tio ĉu cedi al senprincipaj minacoj por eviti "polemikojn", eĉ je la kosto de la vero, aŭ ne.

3. "Privatan" korespondadon pri UEA (ktp.) mi plu lasas al la proponinto kaj al tiuj, kiuj deziras korespondi kun li. Mi mem agis kaj plu agos publike, senkaŝe, en mia funkcio de prezidanto.

4. Se efektive la verkinto havas "malsaman opinion" pri la "vojoj de nia movado", li povas, same kiel ĉiu ajn membro, prezenti konkretan proponon al la Estraro pere de la ĝenerala sekretario.

5. Bonintenco, konstrua kaj tial sana kritiko, esprimita en normale ĝentila formo, estas certe bonvena. Tute alia afero estas misprezentoj, kiuj deformas la veron kaj donas komplete falsan bildon pri la realo. Tiajn negativajn fenomenojn devas kontraŭbatali ne nur la prezidanto aŭ la Estraro, sed la tuta membraro en la intereso de la celo, pro kiu ni organiziĝis.

I.L.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 451, 1 novembro 1971

NOVA HEREDAJO

La dumviva membro de UEA Magda Bohman-Carlsson forpasis en la 7a de septembro ĉi-jare (vidu la paĝon 203). Ŝi, kiu dum sia vivo multon donis por Esperanto, faris lastan kontribuon ankaŭ per sia testamento. Laŭ ĝi, UEA mem heredas 5 000 svedajn kronojn (ĉ. 3 325 gld.). La nomo de f-ino Bohman-Carlsson estos enskribita en la Oran Libron de UEA.

E.J. Woessink,
estrarano pri financoj

PLIAJ KOTIZŜANĜOJ

Pro la lastatempaj kurzoŝanĝoj inter la guldeno kaj diversaj aliaj valutoj, necesis kelkaj pliaj ĝustigoj de la membreco- kaj abon-kotizoj, jene:

	MJ	MA	MS	J-MJ	J-MA
		MA-K			SA
\$ aŭs./n-z.	4,—	8,—	12,—	2,—	6,—
liroj	2800	5600	8400	1400	4200
draĥmoj	150	300	450	75	225

Abonkotizoj de *Kontakto*: \$aŭs./n-z. 2,15; 1500 liroj; 80 draĥmoj.

Abonkotizo de *La Monda Lingvo-Problemo*: \$6,70 aŭs./n-z.; 4700 liroj; 250 draĥmoj.

NOVA ĈEFDELEGITO POR FINNLANDO

UEA havas novan ĉefdelegiton en Finnlando. Li estas s-ro Jussi Jäntti, kiu estis LKK-ano en 1969 kaj estas nun komitatano de TEJO. S-ro Joel Vilkki, kiu diligente plenumadis la oficon de ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo kaj poste de UEA jam de 1946, devis retiriĝi pro aĝo kaj sanstato. Dankante lin pro kvarona jarcento da servado, ni samtempe deziras al li merititan ripozon en sia trankvila patrolando.

La adreso de s-ro Jäntti, al kiu oni de nun direktu ĉiujn kotizpagojn, delegitajn kandidatiĝojn k.s., estas simple: ESPERANTO, PL 7, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando. Poŝta ĝirkonto: KU 8344-1.

NOVA PERANTO MADAGASKARA

En Madagaskaro funkcias nova Peranto de UEA: S-ro E. Raveloson, B.P. 1678, Tananarive.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de februaro 1972 ne niu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Acoroj: Manuel Gomes (D, FD), Silveira. **Belgujo:** Henri Vanderhaegen (D, JD), Andrimont; Philemon Van Geit (FD), Bruxelles; Maurice De Clercq (FD), Dilbeek; Herman Jurdan (D), Soumagne. **Finnlando:** Matti Hakala (D), Harjavalta; Pauli Halonen (D, FD),

Kuopio; Soili Raulo (D), Suonenjoki. **Francujo:** Jean Amouroux (FD), Perpignan; François Leeb (FD), Chamalières. **Grekujo:** s-ino Urania Georgiadu Sari-sanni (FD), Athinai. **Hispanujo:** Antonio Criach Valls (FD), Barcelona. **Hungarujo:** Imre Ferenczy (D), Gyöngyös; d-ro Miklós Gáboros (FD), Pécs; Árpád Rátkai (FD), Szeged; Péter Tihanyi (D, FD), Tata-bánya. **Islando:** Baldur Ragnarsson (D), Reykjavik. **Jugoslavio:** d-ro Ivo Borovečki (D), Pula. **Kanado:** Lorcán Ó Huiginn (FD), Ottawa. **Kubo:** Antonio José Santana López (D), Puerto Padre; Claudio Santiago Maderos Padrón (D), Sagua la Grande. **Nederlando:** M. Verbaken (FD), Eindhoven. **Nov-Zelando:** Robert Harding (D, FD), Napier; s-ino Margaret King (D), William H. King (VD), Whangarei. **Pollando:** Antoni Madej (D), Tomaszów-Maz. **Rwanda:** José Jacob (D), Butare. **Svedujo:** s-ino Iva Åberg, (FD), Göteborg. **Usono:** R. Kent Jones (FD), Chicago; Allan C. Boschen (FD), Pittsfield.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971)

Aŭstrujo: Linz a.d. Donau (FD). **Belgujo:** Antwerpen (VD, FD bestprotektado); Bruxelles (FD filatelo). **Brazilo:** Juiz de Fora (FD elektrotekniko). **Britujo:** Watford. **Ĉeĥoslovakujo:** Abertamy; Rimavská Sobota. **Danlando:** Nærum. **Francujo:** Strasbourg (D, FD meteorologio); Paris (FD medicino). **Islando:** Reykjavík (FD). **Italujo:** Udine. **Jugoslavio:** Kranj (VD, FD); Skopje (FD matematiko); Zadar (D). **Kanado:** Trois-Rivières. **Nederlando:** Haarlem (FD komerco); Rotterdam (D, FD turismo). **Nov-Zelando:** Hawera; Taupo. **Pollando:** Blachownia; Glucholazy; Opole (D). **Svedujo:** Malmö (FD turismo); Stockholm (FD edukado metia). **Usono:** Chicago (FD lingvoj); Monte Sereno; Utica. **Venezuelo:** Caracas (FD komerco).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Feldhäuser, Bernd; Neustadt, F.R. Germanujo.
Kaŭakami, f-ino Tamiko; Oslo, Norvegujo.
King, G.; Enfield, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

246 Wekker, E.L.; Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1972

1 Bernard, R., Francujo. 2 Epstein, Felix, F.R. Germanujo. 3 Fournier, Arthur H., Usono.

DONACOJ (gld).

Fondaĵo Canuto: Meksiko: Joseph Casto, 312,21. Sumo ĉijara ĝisnuna 757,25.

Ĝenerala kaso: Britujo: S. Tillyard, 13,78. Nederlando: A.N. de Kleine, 5,—; J.C.L. Smit, 100,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 3405,44.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

44 L. Brieger, Brazilo.

45 s-ino G. Wolff, Belgujo.

46 K.J. Moberg, Svedujo.

Patrono A de TEJO: 52 H.J. Lewis, Kanado.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

45-jara teknika laboristo deziras korespondi kun aziaj aŭ afrikaj gesinjoroj. Ĉiuj ricevos respondon. G.J. Brons, Da Costaplein 37, Maassluis, Nederlando.

21-jara juda antropologistudento d.k. kun aliaj samreligiaj pri judaj kutimoj kaj problemoj en aliaj nacioj. George Reinhart, SUPO Box 9820, Tucson, Az. 85720, Usono.


Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

15-a Esperantista Skiferio, Adelboden, Svislando. De la 26-a de decembro '71 ĝis la 5-a de januaro '72. Petu la detalan informilon: Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314 La Sagne (Svislando).

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

S-ro Asen R. Sokolov, 23-jara fraŭlo amanta la naturon, poezion kaj la kantojn, deziras havi geamikojn el ĉiuj partoj de la mondo. Daŭra adreso: ĉe Bulgara Esperantista Asocio, Poŝta kesto 66, Sofio, Bulgarujo.



Por tre grava urba ekspozicio, infanoj el la tuta mondo sendu viajn desegnaĵojn ĝis jarfino al: Esperanto-ekspozicio, Ayuntamiento, Santa Coloma de Gramanet (Barcelona), Hispanujo.

Se vi havas malnovajn Esperanto-librojn kaj revuojn, bv. skribi al mi. S-ro Ramón Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Gestudentoj dezirantaj korespondi, kolekti kaj interŝanĝi materialon laŭ la temoj — esperantologio, interlingvistiko, ĝenerala lingvistiko; aŭ iuj, kiuj serioze interesiĝas pri fak-instruado de esperantologio kaj interlingvistiko en la Universitato de Budapeŝto, bv. skribi al: Scienca Rondo Studenta, Universitato ELTE, Budapest V., Pesti B. u. 1-3, Hungarujo.

Intelektulo plurlingva deziras amikecan korespondadon. Leopoldo Goldenzweig, Estrada Três Rios 238 casa 8, 20000 Rio de Janeiro, ZC 89, Brazilo.

Antonio Tuduri komunikas al siaj korespondantoj kaj amikoj, ke de 1 decembro lia nova adreso estos: Calle Anuncivaj 21, Mahon, Balearaj Insuloj, Hispanujo, kie li ankaŭ oficos kiel delegito.

Seriozajn korespondanoncojn por senpaga aperigo akceptos O. Kníchal, red. de "Starto", organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Praha 2, Poštovní schránka 8, Ĉeĥoslovakio.

Sendu salutojn, Esperantaĵojn, prospektojn ktp. por ekspozicioj al Rostova Esperanto-Klubo, Melnikov, Rostov-Don 7, ab. jaŝ. 233, Sovetunio. Dankrespondo certa.

Senkoste gastigas la membroj de la junula Esperanto-grupo en Lohne (F.R. Germanujo) junajn eksterlandajn geesperantistojn dum nelimigita tempo por ekzerci esperantlingvan konversacion. (Senkostaj loĝado kaj manĝado)! Interesitoj anoncu sin al s-ro Franz Kruse, D-2841 Südlöhne, F.R. Germanujo.

Famekonatan francan brandon Konjako disvendas s-ro Despeyroux, reprezentanto, 200 Fg St-Denis, F-75-Paris 10e. Ekspedo el la produkto en ĉiun pagipovan landon. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiitaj. Informpetu!

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

LABORI EN ROTTERDAM ?

De tempo al tempo aperas ebleco dungi novajn oficistojn en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. Laboro en la plurnacia medio de la Centra Oficejo donas interalie la eblecon sperti la internacian uzon de Esperanto kiel ĉefa ĉiutaga lingvo kaj konatiĝi kun la monda movado ĉe ĝia koro mem. Se vi volus labori profesie por Esperanto kaj opinias, ke viaj talentoj kaj kvalifikoj estus utilaj en la Centra Oficejo, skribu al ĝia direktoro p/a Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Librotenisto estas aktuale bezonata por gvidado de la tuta librotenado, kapabla memstare kompili bilancon kaj konanta iom la agadon de UEA.

KORESPONDEMULOJ

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

ESPERANTO

64-a Jaro 1971

INDEKSO

Abstinado 55
Aeronaŭtiko 163
Afriko 12
Akademio 138, 196, 203
Al-Amili, H. M. 207
Alfabeto literuma 87
Alonso-Núñez, A. 11
Antaŭ 50 jaroj 33, 123, 196
Antiloj 46
Argentino 54
Arto 73, 152
Aruba 46
Aŭstrujo 14, 93
Aŭtomobilismo 157
Azio 157

Belgujo 19, 52, 53, 54, 82, 134, 137, 157, 168, 208
Biblioteko 114, 179
Blinduloj 154, 179
Brazilo 10, 17, 157
Britujo 10, 19, 42, 54, 94, 157, 193
Bulgarujo 10, 132, 179, 193

CED 29, 101, 108, 146
Ciccanti, A. 72
Citaĵoj 16, 33, 95, 148, 176, 179
Cseh, A. 81, 115

Ĉeĥoslovakujo 10, 72, 135, 207
Ĉina Popola Respubliko 162

Dahl, E. 22
Danlando 19, 208
Debato 42, 150
Diskoj: vidu ĉe Eldonaĵoj

Edukado 2, 182 (vidu ankaŭ ĉe Lernejoj)
Ekspozicio 55, 157
Eldonaĵoj: ĝenerale 64, 101
 Atombomba malsano 88
 Besto-farmo, La 89
 Bona ŝanco 184
 Brazilo kantas por pli bona mondo 69

Ĉarto de UN 101
Disko (novele) 50
El Manĵoo 156
Esperantaj normoj 9, 89
Esperanto-português 167
Estiĝo de la tero kaj de la homo 156
Eta bukado 28
First foreign language for all mankind, A 129
Gajaj klubvesperoj 50
Heroldo de Esperanto 124, 214
Humoroj 106
Internacia kuir-libro, La 206
Jen Londono! 156
Kantoj kaj romanoj 166
Kaprico '70 88
Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj 167
Kosmoŝipo Edeno n-ro 5, La 206
Kruko kaj Baniko el Bervalo 9
Landolimo jam pasis 185
Libero kaj amo 106
Libro de apokrifoj 185
Miozoto 185
Monda lingvo-problemo, La 101
Mondo rakontas, La 129
Ni aktoras 129
Ni ludas teatraĵojn 206
Nokto da timo 168
Norda naturo 184
Parler l'Esperanto 107
Perfektiga kurso 88
Por pli bona mondo 50
Praktiko, La 118
Pri internacia lingvo dum jarcentoj 29, 68, 101
Pri la kometo 167
Sep reĝidoj, La 28
Struvelpetro, La 106
Tra lando de indianoj 156
Tradicia Vjetnamio, La 166
Venu amikoj 9
Voce sabe Esperanto? 107

Vole... novele 166
Eldonaĵoj krome aperintaj kaj ricevataj 17, 28, 69, 89, 107, 129, 158, 168, 185, 207
Enkonduko de Esperanto 82, 203
Esperanto en la evoluo de moderna penso 84
Esperanto-gramatiko 33, 38, 73, 169
Esperanto-instruado 21
Esperantologio 13, 104, 202
Esperanto-Tago 142
Espermenso 72, 207
Estontecologio 204
Estraro: vidu sub UEA
Eŭropa Ekonomia Komunumo 33, 108 121, 141, 144, 148, 149
Eŭropo 2, 16, 22, 54, 72, 172, 189, 207

Fervojoj 2, 11, 114, 123
Festoparolado 142
Filatelo 132, 172
Filmoj 2, 153
Financoj: vidu sub UEA
Finnlando 54, 103, 162, 207
Forumo 42, 144, 149
Francujo 10, 15, 34, 72, 114, 132, 135, 193, 207

Gazetaro 8, 103, 146, 149, 174
Germanujo (D.R.) 10, 34, 132
Germanujo (F.R.) 10, 19, 53, 54, 114, 134, 135, 137, 157, 193, 198, 207
Goldsmith, C.C. 93
Grabowski, A. 122
Grekujo 72, 132, 157

Harry, R. 157
Heredaĵoj 18, 139, 216
Hindujo 10, 54, 172
Hipioj 72
Hispanujo 34, 72
Historio 54, 66, 84, 166
Humanismo 176
Hungarujo 4, 10, 34, 53, 72, 93, 101,

189, 193
 Impostoj 19, 39
 Informado 90, 103, 115, 119
 Instituto Hodler '68, 118
 Internacia ekzameno 39
 Internacia somera universitato 13, 113
 Internaciismo 50, 163
 Interpretado 109
 Intervjuoj 25
 Irlando 13, 56
 Islando 135
 Israelo 10, 198
 Italujo 4, 19, 73, 94

 Japanujo 54, 94, 109, 163
 Jonas, F. 115
 Jugoslavio 179
 Junulara kongreso: vidu ĉe Kongresoj
 Junularo 55, 81

 Kalendaro 35, 95, 140, 194
 Kalocsay, K. 173, 196
 Kampanjo 100 x 100 158
 Kampado 132
 Kastora klubo 192
 Kemio 11
 Kolombio 132
 Komenco bona — ĉio bona 133, 159, 177, 195, 214
 Komerco 11, 172
 Komunikado por amaso 45
 Kongresoj:
 UK 56a en Londono 14, 36, 41, 42, 74, 97, 113, 141-155, 175
 57a en Portlando (Oregon) 96, 136, 147, 190, 209
 IJK 27a en Edinburgo 41, 57, 94, 174
 28a en Pollando 209
 Infankongreseto 41, 113, 154
 Konkursoj:
 Belartaj 56, 155, 186
 Esea 75, 204
 Oratora 42, 155
 Korektoj 38, 79, 189
 Koresponda servo 118
 Koreujo 132
 Kubo 58, 102
 Kulturo 62, 153, 182
 Kursoj 22, 32, 52, 53, 62 (vidu ankaŭ ĉe Televida kurso)
 Lapenna, I. 4, 34, 101, 173 (vidu ankaŭ ĉe Estraro sub UEA)
 Lerneja Bulteno 52, 134, 192
 Lernejoj 62, 192
 Leteroj 12, 38, 56, 73, 117, 151, 176, 162
 Lingva porblemo 12, 22, 46, 109, 121, 162, 163, 168, 176, 195
 Lingva servo 33, 169
 Lingvistiko 52, 73, 132, 172
 Lingvoj 5, 46, 48, 104, 115, 148

Lingvo-projektoj 65
 Literaturo: vidu ankaŭ ĉe Eldonaĵoj
 ĝenerale 11, 25, 44, 93, 132, 149
 itala, "Piano dum la nokto" (Giacomo/Pisoni) 186
 originala, "La disigitaj" (Grabowski) 122
 "Maria" (Sekerĝiev) 186
 "Pri nia kor' " (Kalocsay) 196
 "Sarmiento el la vivo" (Miyamoto) 165
 "Sendormemo" (Rossi) 6
 Litova lingvo 104
 Loke-Fake-Persone 10, 34, 54, 72, 93, 114, 132, 157, 173, 189, 206

 Madagaskaro 189
 Magnetofona servo 197
 Medicino 11, 52
 Metamorfozo 163
 Miyamoto M. 165
 Mongolujo 189
 Mono 66
 Movado: 1, 23, 54, 84, 92, 124, 159, 214
 Mozambiko 172
 Muziko 2, 9, 73, 115, 132, 152, 153
 Naturamikoj 34
 Nederlando 15, 34, 39, 82, 102, 134, 193, 207
 Nekrologoj 35, 50, 95, 116, 138, 151, 178, 184, 203
 Neŭtraleco 150
 Nguyen van Kinh 157
 Nobel-premio 92, 108, 207
 Normigo 197
 Norvegujo 2, 72, 93
 Nov-Zelando 77
 NRO 183

 Oficiala informilo 18, 39, 58, 79, 99, 118, 139, 160, 179, 198, 216
 Olimpiado 109
 Oriento-Okcidento, Serio 101
 Papiamenta lingvo 48
 Pasporta servo 116, 161
 Pentarto 172
 Pollando 10, 11, 25, 37, 53, 54, 72, 82, 93, 101, 114, 135, 172
 Pompilio, G. 157
 Por pli efika informado 8, 27, 65, 91, 112
 Portugalujo 179
 Poŝtmarka kolektado 78
 Prelegoj 103
 Principaro de Frostavallen 27, 112
 Psikologio 23
 P.T.T. 189
 Pupteatro 73, 157

 Radio:
 ĝenerale 32, 98
 elsendoj en 1971 16, 58, 76, 117,

158, 178
 Radio amatora 55, 87, 194
 Ragnarsson, B. 23, 92
 Recenzoj: vidu ĉe Eldonaĵoj
 Recenzo-kondiĉoj 9
 Redaktado 90
 Reklamado 73
 Religio 12, 115, 172
 Rezolucioj 147
 Rumanujo 10, 157

 Scienco 11, 44, 75, 172, 182, 204
 Sekteco 112, 151
 Semajno de Internacia Amikeco 82
 Seminarioj 15, 137, 208
 Senegalo 95
 Sennaciismo 4, 11, 189
 Simboloj 44
 Skoltoj 55, 62, 73, 189
 Sovetunio 34, 37, 54, 82, 132, 135
 Spesmilo 66
 Sporto 34, 93, 109
 Sud-Ameriko 173
 Svedujo 19, 22, 55, 72, 82, 93, 132, 172, 189

 Tajpilo 168
 Teatro 153, 157, 173
 TEJO 14, 37, 57, 77, 81, 94, 116, 137, 161, 174, 201, 208, 209
 Televida kurso 101, 102, 142
 Televido 2, 62
 Terminaroj: vidu ĉe Vortaroj
 Tradukado 25, 173
 Turismo 55, 62, 93, 115, 136, 212

 UEA:
 ĝenerale 21, 150
 Centra Oficejo 101
 Delegitoj 12, 179, 197
 Elektoj 141, 160
 Estraro 34, 101, 141
 Fakaj organizaĵoj 154, 160
 Financoj 101, 124, 158
 Ĝenerala kunveno 146, 148
 Junulara sekcio 101, 142 (vidu ankaŭ ĉe TEJO)
 Komisionoj 141, 147
 Komitato 39, 141, 160
 Kotizoj 179, 198, 216
 Laborplanoj 142
 Membro-statistiko 38, 58
 Regularoj, statuto 142, 150
 UK: vidu ĉe Kongresoj
 Unesko 142, 181
 Unuiĝintaj Nacioj 2, 101
 Usono 10, 19, 32, 62, 83, 95, 114, 135, 172, 189, 190, 207

 Venezuelo 198
 Vjetnamujo 189
 Vortaroj 109, 212

 Wüster, E. 11
 Zamenhof, L.L. 67, 143, 183, 202, 213

ĈU VI DEZIRAS GAJNI 10-TAGAN EKSKURSON TRA POLLANDO?

Partoprenu la novan konkurson de la Pola Radio

“FORUMO – EŬROPO – 71”

La respondo al ambaŭ subaj demandoj ebligas lotumgajni unu el la ĉefaj premioj – 10-tagan senpagan ekskurson tra Pollando:

1. Kiel vi rilatas al la propono de la socialismaj landoj kunvoki konferencon pri la afero de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, kaj kion vi atendas de tiu ĉi konferenco?
2. Kiuj personoj en via lando, kaj en kia maniero, speciale meritiĝis por la afero de la paco?

Inter la partoprenontoj de la konkurso krom la ĉefpremioj estos lotumitaj multaj objektaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn kun la respondoj oni devas sendi al la adreso: Pola Radio, E-Redakcio, Varsovio-1, Skrytka 46, Pollando, en kovertoj signitaj per la devizo: ‘Konkurso’ – ĝis la **31-a de decembro 1971** (decidas la dato de la poŝta stampo). La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la **31-an de januaro 1972**.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefpremioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Invitante al la partopreno en la konkurso, ni samtempe petas ĝin vaste diskonigi inter viaj konatoj, samklubanoj, leteramikoj. Ni kredas, ke en la konkurso, kiu kongruas kun la pacaj idealoj de la E-movado, amase partoprenos la esperantistoj.

Bonŝancon en la lotado de la premioj!

POLA RADIO

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

1972

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

20-26 februaro

Okaze de la Libro-Tago

RETORIKO

3-a eldono tole bindita

La plej utila kaj bela donaco

20,— gld.

al si mem kaj al geamikoj.

Ekkonu la purecon de kristanismo per legado de

**ANTAŬ DU MIL JAROJ
PAŬLO KAJ STEFANO**

Eldonis: Federação Espírita Brasileira — Brazilo.
Mendebla ĉe Libroservo de U.E.A.



Kristalojn

Mineralojn

ĉiuspecajn el la tuta mondo mi deziras aĉeti daŭre.
Aŭ rekte el minejoj aŭ tutaj kolektoj.

Skribu al: Harry Borchert (Mineraloj), D-3392 Clausthal-Zellerfeld, Adolf Römerstr. 17, F. R. Germanujo.

La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

53 originalaj desegnaĵoj de

A. Uniechowski

244 paĝoj

Prezo: 3 us. dol. (42 steloj)

(Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon
en valoro de 0,30 us. dol. por aĉeto de
"Fabeloj, vol. I".)

Eldonis: Heroldo de Esperanto

13 rue de la Reinette (Pippelingstr.),
B 1000 Bruselo.

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA





Nun reaperis du el la plej gravaj romanoj
origine verkitaj en Esperanto
kune en unu bindo!

- Produktitaj surbaze de la hungaraj originaloj
- Fortika bindo kun plasta kovrilo
- Intervorto de Marjorie Boulton
- 504 paĝoj da streĉa legaĵo
- Prezo nur 60,- d.kr.



Eldonejo TK
Hjortespringparken 60
DK-2730 Herlev

Dana poŝtĉekkonto 7 95 58
Germana " Hamburg 36 17
Nederlanda " 1806731

Ges-roj George kaj Rita Aagaard, 34 Sherbourne Road,
Auckland 3, Nov-Zelando, kun siaj genepoj, okaze de la
naskiĝtago de s-ro Aagaard.

Speciale grava al la familio estis tiu tago, ĉar dum la venontaj
du jaroj ges-roj Aagaard intencis fari longan vojaĝon por
viziti siajn multajn Esperantajn geamikojn en Eŭropo.

Tamen, nur kelkajn tagojn post tiu feliĉa tago, s-ino Aagaard
suferis akcidenton surstrate kaj, anstataŭ vojaĝi, devas kuŝi
en hospitalo dum multaj monatoj. Pro tio, ke la brakoj estas
rompitaj, ŝi ne povas persone informi gesamideanojn pri la
intertempa nuligo de la planita vojaĝo, kaj petas, ke ili ne
atendu respondojn al leteroj senditaj al ŝi.

Al ĉiuj gesamideanoj, kiuj ŝin konas, ŝi sendas salutojn kaj
bondezirojn okaze de la Kristnaska kaj Novjara festoj.



Abonu al:

EL POPOLA ĈINIO

Ĉina Esperanta monata gazeto kun multampleksa enhavo, riĉe ilustrita
kaj kun koloraj bildpaĝoj.

Abonprezoj:

por 1 jaro: £ 0.50, Gld. 5,00
por 2 jaroj: £ 0.75, Gld. 7,50
por 3 jaroj: £ 1.00, Gld. 10,00

Bonvolu aboni ĉe:

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
Rotterdam-3002
Nederlando

Aŭ rekte ĉe ni:

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu, kiu abonas nian gazeton, povos ricevi nian Esperantan kalendaron por 1972.

